

# LA JUNA BATALANTO

Organo de la Internacia  
Katolika Junulara kaj Paca Movado

ELDONATA DE

MONDJUNULARO KATOLIKA, MOKA

Redaktoro : D-ro WILHELM SOLZBACHER.

## ENHAVO :

Vortoj de la Paco al la Katolika Junularo (Ministro Paul Tschoffen). — Pri la Estonteco de Rusujo (Prof. M. V. Ustrjalov). — Senamikeco (Cinn Lae - Lorcan Oh Uiginn). — Vilaĝo de la Katolika Junularo (Vizito en Winfriedheim, W. S.). — Kongreso de la Litova Katolika Junularo Malpermesita. — La Misia Studenta Kongreso (Leopold Bauer). — Kunlaboro (Simbola Ludo pri Paco kaj Esperanto, Vivrenoviĝo kaj Junularo, de Walter Mudrak). — Laboro kaj Batalo de la Katolika Junularo (Raportoj el Francujo, Hispanujo, Danujo, Italujo, Ĉilio, Aŭstrujo kaj Kanado). — La Esperanto-Movado. — Modernaj Fabeloj (J. Van Hilbrinxen). — Internacia Junulara Agado (Katolika Junularo, Komunista Junularo, Socialista Junularo, Protestanta Junularo, Pacifista Junularo). — Sur Nia Librotablo (Recenzo de novaj libroj de internacia intereso). — Nia Movado. — Familia Informo.

REDAKCIO : Köln — Dellbrück, Bensberger Marktweg, 63, Germ.

Eldonejo : ELDONA KOOPERATIVO LA JUNA BATALANTO,  
Köln-Dellbrück, Bensberger Marktweg, 63, Germ. (Regina Solzbacher).



# Abonprezoj de "La Juna Batalanto"

Normala abonprezo : jare 2 germanaj markoj, kun MOKA-membreco 3 M. La eldonejo akceptas monbiletojn, ĉekojn, poŝtmandatojn, respondkuponojn, germanajn poŝtmarkojn.

Lando	jara abono	kun MOKA-kotizo	simpla kotizo	Lando	jara abono	kun MOKA-kotizo	simpla kotizo
Anglujo	2 s 4 p	3 s	1 s 3 d	Hungarujo	2.4 p	4 p	2 p
Argentino	1.50 p	2 p	1 p.	Italujo	9 l	14 l	5 l
Azio	2 s	3 s	1 s 3 d	Japanujo	2 s	3 s	1 s 3 d
Aŭstralio	2 s	3 s	1 s 3 d	Jugoslavujo	30 din.	40 d	15 d
Aŭstrujo	3,40 s	5 s	2 s	Litovujo	5 lit.	7 l	3 l
Belgujo	3,50 b	6 b	2 b	Luksemburgo	18 fr	25 fr	10 fr
Brazilio	4 mr	5 mr	2 mr	Meksiko	0,50 dol	0,75 d	0,30 d
Ĉeĥoslov.	16 kr	20 kr	10 kr	Nederlando	1,25 fl	2 fl	0,80 fl
Danujo	2 kr	3 kr	1 kr	Polujo	4 zl	6 zl	3 zl
Danzig	2 g	3 g	1,20 g	Portugalo	8 esc	12 e	5 esc
Francujo	12 fr	18 fr	6 fr	Rumanujo	80 lei	100 l	40 lei
Germanujo	2 M	3 M	1,20 M	Svedujo	2 kr	3 kr	1 kr
Grekujo	38 dr	50 dr	15 dr	Svisujo	2,50 fr	4 fr	1,50 fr
Hispanujo	3 p	4,50p	2 p	Usono	0,50 dol	0,80 dol	0,30 dol

Ni akceptas ankaŭ pagojn por duona jaro aŭ kelkaj jaroj. Membroj de MOKA ricevas ankaŭ aliajn publikigaĵojn. Donacoj por la subtena kaso (liverado de J. B. al malriĉuloj) estas invitataj.

**Abonejoj :** Krom al la eldonejo oni povas ankaŭ pagi al la naciaj sekretarioj de MOKA.

**Poŝtkontoj.** Germanujo : Köln 480 37 (Dr. Wilh. Solzbacher, Köln-Dellbrück); Francujo : Strasbourg 8180 (P. I. A. Muffang, Bourg-la-Reine); Aŭstrujo : Wien D 12.017 (Katholisches Kreuzbündnis für Oesterreich, Ortsgruppe Heiliges Feuer); Svisujo : Luzern VII. 2030 (Schweiz. Kath. Jungmannschaftsverband, Zug); Belgujo : 3313.51 (Imprimerie Disonaise, M. Jean Winandy).

## ĈETU KAJ DISVASTIGU NIAJN PROPAGANDFOLIOJN KAJ BROŝUROJN!

**Mondjunularo Katolika**, kvarpaĝa informilo pri celo, historio, organizo kaj agado de MOKA (en Esperanto), 10 ekz. 0.25 RM, 50 ekz. 1.— RM.

**Les Œuvres Internationales de Jeunesse Catholique**, 40-paĝa broŝuro en franca lingvo, 2 fr. fr. (0.35 RM.).

**La Jeunesse Mondiale Catholique**, kvarpaĝa varbilo en franca lingvo. 10 ekz. 1 fr. fr. (0.20 RM.), 50 ekz. 4.— fr. fr. (0.70 RM.).

**Dans 60 pays**, dupaĝa varbilo en franca lingvo, 25 ekz. 1.50 fr. fr. (0.25 RM.).

**Die katholische Jugend lernt Esperanto.** Kvarpaĝa varbilo por Esperanto (en germana lingvo). 50 ekz. 0.80 RM, 100 ekz. 1.50 RM.

**Katholiken, lernt Esperanto!** La sama varbilo kun alia titolo. Sama prezo.

**Die Katholische Weltjugendliga.** Moderna informa broŝuro pri MOKA en germana lingvo, aperinta 1932, 12 paĝa. 0.15 RM, 5 ekz. 0.50 RM.

**Die Katholische Weltjugendliga.** 16 paĝa broŝuro aperinta 1929. Plej bona informilo pri la historio de nia movado. 0.30 RM.

**Wir Katholiken und die internationale Jugendbewegung.** Von Hanns Sappl. 48 paĝa broŝuro aperinta 1921 kun antaŭparolo de episkopo Majlath, protektoro de MOKA. Grava por ĉiu, kiu deziras ekkoni la originojn de la MOKA-movado. 0.30 RM.

**Eldonejo LA JUNA BATALANTO, Köln-Dellbrück, Bensberger Marktweg 63.**

## Vortoj de la Paco al la Katolika Junularo.

Tri kancermalsanoj dismordas la ŝtatojn : la protektismo, kiu estas por la rajtigita zorgo pri la defendo de la naciaj produktaĵoj tio, kio la egoismo estas kompare al la memrespekto; la militismo, kiu intermiksas la rajton de ĉiu popolo, defendi sian sendependecon, kun la aroganta rajto, minaci la sendependecon de sia najbaro; la naciismo, terura transformado de la plej alta ŝtatana virto, la patriotismo, kiu anstataŭas la amon al la patrolando per la malamo al la aliaj nacioj.

Junuloj, ĉi tiuj vortoj estu por vi! La fratecan mondon, al kiu la pliaĝuloj celadis senpove kaj kun tremantaj manoj, vi konstruados ĝin! Tio estas neeblo, oni diras, militoj ĉiam ekzistis... Silentigu do tiujn voĉojn de malfeliĉo. Rememoru, ke nenio granda realiĝis dum ĉiuj jarcentoj, kio ne estis konsiderita antaŭe nerealigebla!

Estis epoko, kiam la homo ne foriris el sia kaverno sen bastonego en la mano. Ĉu oni bezonos same multe da jaroj, por malarmi la naciojn, kiom da jarcentoj oni bezonis, por malarmi la individuojn?

Junuloj, prenu la torĉon! Se ne por revii tion, kion ni ne povis efektiviĝi, se ne por realigi la revojn unue tiel fierajn kaj poste tiel malebriigitajn de viaj patroj, por kio, junuloj, por kio do servus vin viaj 20 jaroj?

*Paul TSCHOFFEN*, Belga Ministro de la Kolonioj (en « La Terre Wallonne »).

## PRI LA ESTONTECO DE RUSUJO

Ĉiuj rusoj, kiuj elmigris pro la politika subpremo, interesiĝas pri la estonta rolo de la rusa junularo en Rusujo mem, kiel ankaŭ inter la elmigrintoj. Antaŭ nelonge *Profesoro M. V. Ustrjalow*, kiu loĝas en Harbin (Manĉurio), publikigis broŝuron (« Ŝanĝo en la juna generacio »). Lia opinio certe trovas protestojn kaj kontraŭdirojn, tamen estas interesa pro ĝia seniluzia klareco :

La junularo de la elmigrintoj volas trovi sian vojon al Rusujo, precipe ideologie. Sed ĝi ne rajtas pensi, ke ĝi estos « heredanto de Stalin ». Ĉar inter tiu eŭrazia junularo de la elmigrintoj kaj la reprezentantoj de la Komsomol (komunista junularo en Rusujo) ankoraŭ troviĝas abismo. Tamen estas bone, ke nia junularo observas kaj studas la evoluon en Rusujo. Sed sensenca estas la nun disvastigata opinio, ke en Rusujo povus esti realigata nacia revolucio. Oni revas pri rusa Hitler-o. Oni volas krei naciistajn-komunistajn grupojn laŭ faŝista ekzemplo, sektojn de soldatoj-monaĥoj de la nacia revolucio. La fino de la bolŝevista revolucio ne estos preparata de la elmigrintoj. Sed la politika revolucio transformiĝos en kulturen. Tiam denove ekbrilos la steloj de la pli altaj valoroj, kiuj ĝis nun estis vualitaj per la fumo de la socia brulo. Tiam venos la tempo de la larĝa sintezo kaj de la kreokapablaj renkontiĝoj. La junularo de la elmigrintoj devas atendi. Ĉar ne nur tiuj junuloj, sed ankaŭ la jun-komunistoj estas submetataj al ŝanĝiĝo.

EN MAJO komenciĝis la 7-a jarkolekto de nia gazeto. Kaj vi ankoraŭ ne pagis?

Ĉu vi scias, ke via forgesemo bojkotas la laboron de oferemaj kunbatalantoj? Helpu, sendante tuj la modestan abonkotizon!



# Senamikeco.

*El irlanda lingvo tradukis Lorcan Oh Uiginn.*

Estis la unua tago el la somera libertempo.

Mi estis staranta ĉe la marbordo, apud urbeto fama en la Conndae Ciaruidhe (elparolu : Konde Kirii), oriente en Irlando. Vespero bela, mola, kvietaj estis—la ondoj de l'Atlanta Maro naĝantaj malrapide kontraŭ la marmuroj, molaj sonetoj, la femuziko de la venteto; maro laca ruliĝanta antaŭ miaj okuloj; marbirdoj blankaj flugantaj malalte super la maro kaj ekkriegantaj malĝojeme, ĝemantaj..... La suno malleviĝis je la alia bordo de la haveneto, ĝiaj ruĝaj radioj dissonis en la ĉieloj, sur la altaj montoj, sur la akvo bluverda. Fee grandioza, majesta, belega — diras pri ĝi la poetoj — sed, ho ĝemo, ĝemo, mi ne estas homo poeziema.

Kiel senamikema la loko! Ne antaŭe mi spertis aŭ eĉ pripensis pri iu loko tiel soleca. Malproksime estas la urbobruo, tiu urbo, el kiu mi eliris la hodiaŭan matenon. Estas la sepa vespere.

Mi estus ekiranta al la teatro nun, se mi nur ne estus fariĝinta freneza, ĉar, se mi posedus streketon da saĝeco, mi nun estus en la granda urbo. Ho, ĉu mi ne estis malsaĝulo, kiam mi propravole foriris el B' lă Cliath (elparolu : Blă Kli - Esperante Dublino), B'lă Cliath, la brilega, B' lă Cliath, la aŭtomobila kaj la tramveturilplena, B' lă Cliath de la homamaso kaj de la viveco belega. La senamikeco! Ĝi estis profunde kortuŝanta.

Venis fiŝkaptisto, parolis amike. Post tempo pasigita per rakontado mi ekdemandis lin : « Ĉu vi estis iam senamika? »

« Mi ja estis, karulo, unu fojon » li respondis penseme. Mi ĝojis, tion aŭdi... li estos kompatplena, kaj tiu, kiu posedas kompaton, estas amegata. La fiŝkaptisto daŭrigis sian diron.

« Antaŭ kelkaj jaroj mi devis viziti kuraciston en B'lă Cliath, kaj mi estis devigata, pasigi unu nokton tie. Tiun nokton, mi estis staranta sur la granda ponto, mi ne scias ĝian nomon, kaj mi vere estis kapkonfuzata. La homamaso iranta de unu flanko al la alia, tien kaj reen, kaj ili ĉiuj rapidegantaj. La bruoj kaj la lumego! Mi estis kvazaŭ surda; kaj la brileco, ĝi igis min preskaŭ blinda. Mi pensis pri ĉiu boneco, kiu mankis dum tiu neforgesebla nokto. Amiko mia, mi pensis pri la marbordo, pri la bluverda maro, la montoj, ĉiuj. Mi preĝas, ke estu malproksimege por mi, stari denove en tiu sama urbo. Ho, kompatindaj ili, kompatindaj urbanoj! Mi ilin kompatos en eternon! »

*El « Cinn Lae », vespera ĵurnalo irlandema.*

## VILAĜO DE LA KATOLIKA JUNULARO

*Vizito en Winfriedheim.*

Ekonomia krizo kaj senlaboreco, bankrotoj kaj skandaloj ŝajnas esti la signo de nia tempo. 25 milionoj da laboristoj, inter ili 6 milionoj sole en Germanujo, estas senlaboraj. Milionoj da gejunuloj havas fortajn manojn, utilajn konojn kaj bonan volon — kaj ili devas putriĝi kaj pereji en malespero. Kion ili povas atendi de la estonteco? Nenion! Unuj falas en indiferentan vegetadon, aliaj kuras al revoluciaj movadoj. Ili sentas sin ekzakte en la situacio de la Komunisto Manifesto : « Ni povas nenion perdi ol niajn katenojn, ni povas gajni mondon! »

Kaj tamen ne ĉiu espero estas perdita. Ekzistas gejunuloj, kies kuraĝo kaj forta volo venkas la mizeron kaj gajnas novan mondon, por vivi kaj labori. Kaj tiu junularo donas al ni rajton esperi. Miloblaj estas ĝiaj ideoj kaj iniciatoj, al ĉiuj cirkonstancoj ĝi adaptiĝas, sed unueca estas la spirito kaj la ĝoja kuraĝo... spite al ĉio. Unu tia agadejo de katolika junularo estas Winfriedheim.

De Köln tramvojoj portas nin en malpli ol unu horo al la urbeto Bensberg. Kaj de Bensberg ni marŝas malpli ol unu horon. En beleta valo staras kelkaj domoj kaj iamaj fabrikkonstruaĵoj. Malgrandaj boatoj naĝas sur lageto. Kaj meze en la vilaĝo flirtas granda ruĝa standardo, en kies mezo troviĝas blanka kruco kaj blanka rondo. Jam venas el domo unu el la gvidantoj de tiu stranga kolonio kaj salutas nin. Cetere mi forgesis prezenti nin mem : ni estis la ĉefkasisto de la Belga Katolika Laborista Junularo kaj la ĉefsekretario de MOKA. La standardo? Jes, ĝi estas ruĝa, ĉar ruĝe brulas en ni la fajro de la amo, de la entuziasmo, de la renovigo. La rondo nin kunigas al forta komuneco. Kaj super ĉio la kruco de Kristo.

La historio de nia kolonio? Antaŭe estis ĉi tie minejoj. Pli ol 500 laboristoj laboris, por gajni plumbon kaj zinkon el la tero. Antaŭ 7 jaroj oni ĉesigis la laboradon, ĉar ĝi ne plu estis profitdona. La minojn oni detruis, la domojn, konstruaĵojn kaj terenon oni vendis je favoraj kondiĉoj. Tiam ni venis, grupo da junaj katolikoj, kaj laŭ iniciato de Pastro Dahl el Düsseldorf ni fondis Laborkolonian Societon kaj aĉetis la terenon. Al la Societo aliĝis ankaŭ la Katolika Junmetiista Unuiĝo kaj la Asocio de Katolikaj Laboristaj Unuiĝoj de Okcidenta Germanujo. Kion ni volis? Unue ni volis helpi la katolikojn en la diasporo (en protestantaj regionoj). Ni fondis lignajistejon, por fari altarojn, meblojn ktp. Sed dekomence ni ankoraŭ havis alian ideon. La krizo de la kapitalista ekonomio senlaborigas multajn por ĉiam. Ekzistas homoj, kiuj povas eviti tiun sorton de daŭra senlaboreco, fariĝante denove kamparanoj. Tio ne estas facila, ĉar ne sufiĉas, lerni nur la terkulturajn laborojn, oni devas ankaŭ kutimiĝi al la kamparana vivo kun siaj simplaj kutimoj kaj bezonoj. Tio necesigas transformadon de la tuta vivmaniero kaj vivkoncepto de la urbanoj. La vojo ne estas irebla por ĉiuj, eble eĉ ne por multaj, sed por kelkaj... Kaj kiam la senlaboreco pligraviĝis kaj la ideo de la Libervola Laborservo estiĝis en la junularo, do la ideo, ke junuloj kaj junulinoj senlaboraj laboru libervole sen pago por afero de publika utileco, kiu alie ne povus esti farata, tiam tuj nia kolonio fariĝis centro de tia libervola laborservo. La ŝtato, anstataŭ doni subtenojn al la senlaboruloj, donas la monon al ni, kaj niaj junuloj nun forte kaj kuraĝe senarbigas arbarojn, por gajni kampojn. Kelkaj tion faras, por poste mem fariĝi kamparanoj, aliaj ĝin faras, por helpi siajn fratojn.....

Ĉu vi vidas jen la altan abion apud la garbejo? Tie estas nia bieno Birkerhof. Kun la fiereco de fariĝanta terkulturisto la iama seruristo gvidas nin tra la antaŭplaco, kiun oni ĵus nove aranĝas. La domo estas malnova. Jam antaŭ 500 jaroj ĝia nomo troviĝis en dokumentoj. Poste ĝi apartenis al la premonstratensa abatejo Steinfeld. Depost preskaŭ 2 jaroj ĝi apartenas al la Winfriedheim, kies nomo honoras Sanktan Bonifacion, la apostolon de Germanujo (Winfried estas lia germana nomo). Ĝi nun servas al transformado de junaj senlaboraj laboristoj al kamparanoj. Ni sidas en la bela granda ĉambro kaj parolas pri la mizero de la junularo. Ni provas — tiel babilas nia gvidanto — helpi la junularon, kaj ne sensukcese. Matene je la 5-a ili jam estas ekstere. Dum la rikolto premiĝas la laboroj, kaj ĉiuj devas helpi. La tutan tagon. Vespere okazas instruado. Jen librejo, kaj jen en glasoj specimenoj de grenspecoj kaj kemiaj sterkaĵoj. Rajtas veni ĉi tien tiuj, kiuj en la Libervola Laborservo en Winfriedheim montris taŭgecon. Ili restas ĝis duona jaro. Poste oni peras al ili du lernjarojn ĉe kamparano laŭ speciala kontrakto. Jam sufiĉe granda nombro da junuloj sukcesis. Kaj poste ili povas fariĝi koloniistoj. Ĉiuj, kiuj ricevis ĉi tie sian unuan ekzercadon, estas organizitaj en « Laborrondo », kaj de tempo al tempo ili kunvenas ĉi tie por kunvenoj kaj kursoj..... Jen junularo, kiu pene klopodas, por gajni estontecon kaj rilaton al la hejma tero. Jen venas veturilo kun grengarboj. Sur la herbejo promenas bovinoj, kaj en la stalo bruas porketoj.



Ni daŭrigas la vojon laŭlonge de la arbaro. La junuloj de la Libervola Labor-servo senarbigas la arbaron. Kie lastjare ankoraŭ kreskis kverkoj kaj fagoj, oni nun baldaŭ rikoltos la unuajn terpomojn. La laboro estas peniga, sed ĉiuj montras ĝojajn vizaĝojn. Ĉiuj profesioj estas reprezentataj. Jen unu, kiu plej vigle movas la hakilon, estis vendisto, alia ŝuisto, tajloro, ministro, seruristo.

La kolonio posedas grandegan ĝardenistejon. Vastega vitrodomo servas la kulturadon de fruaj legomoj. Jen laboras la ĉarpentistoj. Preskaŭ ĉiujn meblojn en la kolonio ili mem faris, kaj eĉ la ligno estas prenita el la propra arbaro. La altaro en la kapelo, ĉar la kolonio havas konstantan pastron, estas ankaŭ ilia laboro. Gratumojn!

Ni estas invitataj al taso da kafe. Pano kaj kuko, kiujn oni prezentas al ni, venas el propra bakejo. Ankaŭ propran ŝuiston havas la kolonio, kaj la elektron la junuloj mem fabrikas helpe de akvoradodinamo. Do oni estas preskaŭ sendependa de la ekstera mondo. En la kuirejo laboras sub gvido de afablaj monaĥinoj junulinoj, ankaŭ el la Libervola Helpservo.

La taga programo estas interesa. Matene je la sesa ĉiuj leviĝas kaj kolektiĝas ĉirkaŭ la standardostango. Oni kantas matenkanton, kaj dum tio la standardo estas solene suprentirata. Poste okazas gimnastiko. Ĉiuj kune iras al la kapelo, por ĉeesti la sanktan meson. Oni laboras 6 horojn ĉiutage. Vespere okazas kursoj kaj amikaj kunvenoj, ankaŭ religiaj kaj aliaj paroladoj. Ĉiuj kune formas unu grandan frataron. En iamaj laborejoj de la minejo oni aranĝis primitivajn, sed purajn kaj afablajn dormosalonojn. La loĝantoj donis al ili pompajn nomojn: « Artista Loĝio », « Nido de la Falkoj », « Salono de la Reĝna Oro ».

Ni supreniras el la valo, laŭlonge de la vitrodomo, kie maturiĝas tomatoj, laŭlonge de la abelejoj, kiuj liveras mielon, kaj laŭlonge de avenokampo, kiu atendas siajn falĉistojn. Kaj ni venas al malnova, nun restarigita kruco, kiu donis la nomon al la bieno Kreuzhof, plej juna infano el la kolonia familio. La bela domo gastigas grupon da junulinoj el la Libervola Helpservo, kiuj tie okupiĝas pri dommastrumado kaj terkulturo. Ili laboras en domo kaj ĝardeno, posedas kortbirdaron kaj aliajn malgrandajn dombestojn, kudras kaj flikas por la junuloj.

Nun pli ol 120 gejunuloj apartenas al la komunumo. Speciale ĝoja oni estas, ke antaŭ nelonge la Abato de la Cisterciana Abatejo Marienstatt promesis la helpon de sia ordeno. Tiel oni ne nur posedas specialajn eblecojn de lernado en la modelaj bienoj de la Cistercianoj, sed ankaŭ trovis kontakton al la tradicio de la plej malnova koloniiga ordeno, al kiu la eŭropaj landoj kaj ankaŭ Germanujo tiom dankas por ilia kristanigo.

Ni adiaŭas. La gvidanto cetere eĉ iom komprenas Esperanton. Kaj kiam ni reiras al Bensberg, mia belga amiko diras: « Mi miras kaj admiras. Nia junularo devas havi kuraĝon, ne tro fidi helpon de aliaj, sed mem komenci kaj agi! »

Kiam mondo ŝanceliĝas kaj bankrotas, junularo konstruas novan mondon. Dio benu tiun junularon!  
W. S.

## Kongreso de la Litova Katolika Junularo Malpermesita

La Juna Batalanto en sia lasta numero publikigis artikolon pri la jubileo de la Litova Katolika Junulara Asocio Pavasaris (Printempo). Nia julia numero estis en presado, kiam ni ricevis novan leteron de la Prezidanto de Pavasaris, sciigante, ke la litova registaro malpermesis la kongreson. Tial li estis devigata, retiri la inviton al la eksterlandaj gastoj. La letero portis svedan poŝtmarkon, do ŝajne oni eĉ ne povis riski disendi tiun sciigon el Litovujo. La litova katolika junularo sciu, ke ĝi havas nian tutan simpatian, ke ni protestas kontraŭ ĝia subpremo per kontraŭkatolika registaro kaj ke ni deziras, ke baldaŭ ĝi rehavu sian liberecon!

## La Misia Studenta Kongreso

Ĝi estis vere tre sukcesa! Multaj venis: ĉirkaŭ mil studentaj partoprenantoj el Aŭstrujo, Germanujo, Svisujo, Ĉeĥoslovakujo kaj eĉ el Nederlando. En Salzburg regis vigla vivo. Krukmilitistoj marŝis tra la bela urbo, kaj en ĝiaj muroj triumfis la katolika vivo.

La du ĉefaj aranĝoj estis imponaj kaj relasis profundan impreson en la loĝantaro de Salzburg. La unua estis la benado de la Kristofajro kaj la torĉoprocesio tra la urbo ĝis la preĝejo de Sankta Andreo. Ankaŭ en ni ekflamis fajro—la fajro de la apostola spirito. Ni iris silente tra la stratoj en longa procesio, kaj nur alterne, kiel la ekflamo de la Kristofajro en ni kaj de nia entuziasmo, eksonis nia devizo: « Kristo devas reĝi!—Dio volas ĝin! » Antaŭ la preĝejo de Sankta Andreo finiĝis la soleno kun entuziasma parolado de nia « generalo » P. Schütz S. J. kaj kun mallonga vesperpreĝo.

La dua ĉefaranĝo je la tria tago estis la kulminacia punkto de la kongreso. Jam krepuskiĝis. Ni ekmarŝis sampaŝe, kun sennombraj flagrubandoj, en la mezo brava muzika orkestro el nia ĉefloĝejo kaj tendaro. Nia celo, la praantikva tombejo de Sankta Petro (monaĥejo fondita de Sankta Ruperto), estis atingita. Ni staris je la piedo de la katakomboj martelitaj en ŝtonego kaj streĉe atendis. Jen! La « Ave » — sonorilo de la katakombo-preĝejo eksonis kaj anoncis: la soleno komenciĝas. Festparoladis Pastro Giglmayr de la supro de natura roka predikejo. Dum la vortoj: « — kaj fariĝis lumo en niaj landoj, kaj sur ĉi tiu terpeco de antaŭa idolanco — lumo de la Kristanismo — » eklumis la elektraj brililoj, kaj la tuta ŝtonegmuro de « Mönchsberg » (Monto de Monaĥoj) ekflamis kun la katakomboj ankaŭ lumigitaj de interne. La sonorado de Sankta Petro, unu el la plej grandaj, kaj publika fidelecopromeso de la Krukmilitistoj finis la solenaĵon. Ni marŝis al la placo Residenzplatz kaj preĝis tie vizaĝe al la katedralo kaj meze inter la pasantoj nian vesperpreĝon, la liturgian « Completum ». Tio estis emocia atesto, ke la nova katolika junularo ne plu konas homtimon.

La ĉefkunsido okazis en la granda salonego de la internacia muzika instituto « Mozarteum ». En la lasta kunsido paroladis ankaŭ nia kara antaŭa MOKA-sekretario, Fr. Anselm Schwab O. S. B., kiel ni jam sciigis en J. B., pri Esperanto kaj la Misioj. La tempo estis sufiĉe limigita por pli detala pritrakto de la temo, tamen li rikoltis ventegan aplaŭdon. Granda entuziasmo estiĝis, kiam li laŭlegis salutleteron de la antaŭa hina nacia sekretario de MOKA, Pastro Joh. BAPT. Kao, O. F. M.

Kiom ni Esperantistoj el Salzburg povis fari, tiom ni faris, sed la aliaj Esperantistoj, je kiuj ni estis esperintaj, ne venis. Neniu (krom unu MOKA-ano el Burghausen-Germanujo) anoncis sin eĉ ni, kaj en tiuj cirkonstancoj ne estis eble al ni, bati la grandan tamburon por Esperanto kaj por MOKA. Ankaŭ niaj Esperanto-amikoj el Salzburg estis pro tio iomete seniluziigitaj, kaj ni devis ilin konsoli, ke kredeble la nuna ekonomia krizo malebligis al multaj junaj Esperantistoj la veturon al Salzburg. Ĉu ne ŝajnas strange, ke mil studentoj, inter ili eĉ kelkaj el Nederlando, venis, sed ke la junaj katolikaj Esperantistoj forrestis? Do la pioniraro estas ja ankoraŭ negranda. Mi ne volas mallaŭdi tiun fakton, sed nur konstati, ke la katolika junularo Esperantomovado ankoraŭ bezonas tre intensan agadon de ĉiu unuopa, ne el mondaj praktikaj intereso, sed el plej interna konvinko, ke nia laboro kaj penado estas sankta servo por Kristo, nia reĝo!

Leopold BAUER, Salzburg (« Estonteco »).



# KUNLABORO.

*Simbola ludo pri Paco kaj Junularo, Vivrenovigo kaj Esperanto*  
DE WALTER MUDRAK, WIEN.

*Personoj de la ludo* (laŭeble prezentataj per junulinoj en simbolaj kostumoj):  
Paco, Esperanto, Vivrenovigo, Junularo.

*Paco* (simbole vestita, kun palmo en la mano, malrapide, solene enpaŝas, ekhaltas) :

Ho, kiom forgesema estas la homaro,  
Jam paŝas sur malnova vojo de eraro  
Kaj ne plu pensas pri teruro mondmilita,  
Ne plu pri mi, petege tiam sopirita!  
Sed stultaj, kondamnindaj, trompaj nur  
procedoj :  
Jen por mi tostoj dum ĝuplenaj luksbanke-  
doj.  
Jen vetarmad' per plej modernaj mortigiloj,  
Diablaj venengasoj, tankoj, aviadiloj.  
Laŭ herezi' de al perfort' kaj glavo kredo,  
Ke per la cel' sanktiĝas ĉiu ajn rimedo,  
Praktiko de praidolana idearo,  
Ke pacon garantias la militpreparo...!

(malantaŭen iras, restas en meditema stato, flanke en la fono)  
(nun eble ludado de kelkaj akordoj el « La Espero »).

*Esperanto* (ankaŭ simbole vestita, kun verda stelo, eble tenante en mano korbe-  
ton kun Esperantaĵoj) :

Venante ree do de mondmigrado,  
Multflanka propagando kaj servado  
En tiom da kongresoj, konferencoj  
Kun celoj tre diversaj kaj tendencoj,  
Ne malkontente mi konstati povas,  
Ke ĉiam plian mi atenton trovas.  
Kaj malgraŭ tempaj malbonŝancoj,  
Ekonomiaj krizaj cirkonstancoj,  
Gojige la anaro pligrandiĝas.  
Publiko, gazetar' interesiĝas.  
Eĉ en komerco parte kaj trafiko  
De mi jam utiligo kaj apliko :  
(montras Esperantaĵojn)  
Gvidlibroj kaj foirprospektoj,  
Presajoj, tutaj jam kolektoj,  
Raportoj en la tagjurnalo  
Kaj riĉa faka materialo  
Bonege tion ĉi atestas.

Ĉu mi do povas resti,  
Ĉu vera paco esti  
Sur tia ter',  
Duoninfer' ?  
Noktiĝo ĝenerala ĉie, ĉie, (kun plenda gesto)  
Kaj helpo kaj espero, ĉu nenie?  
Cieloj! Mi al vi ne vane plendu, (ĉielen tur-  
nigante)  
Kunulon vi kompate al mi sendu,  
Ho, donu al kristana hom'  
Denove de la am' spiriton,  
Ke ne prediku li militon  
En Dia sankta nom'!

Delonge mi ja ne plu estas  
Fremdulo ia, nekonata,  
Sed fakto pli kaj pli sentata  
En homa vivo kaj kulturo.  
Ĝin pruvas jam literaturo  
Ampleksa, ĉiam pli kreskanta,  
Verkaro proza, poezia,  
En mia vest' internacia  
Homarfratiĝon akcelanta.  
Ho, ke ĉi-lastaj pli progresu!  
Ke per agad' praktikreala  
Mi ne pri flanko ideala  
Nun malatentu kaj forgesu!  
Ĉar estas, kvazaŭ Di-donaco,  
Per Majstro mi al mond' donita,  
De Providenco destinita,  
Ke helpu, servu mi al paco!  
Ho, paco, paco, fine venu!...

*Paco* (ekatentas) :

Jen voko, ĉu mi ĝin komprenu?  
Ĉu nur trompiĝo de l' orelo  
Aŭ voĉo, signo de l' ĉielo? (aliras)  
Saluton, inda vi fratino! (mansalutas)  
Ĉu vi min vokis kun inklino?

*Esperanto* :

Saluton, kia por mi graco!  
Ĉu vi ne estas mem — la paco?

*Paco* :

Kaj vi?

*Esperanto* :

— Jen servantino via : (kliniĝas)  
Neŭtrala kaj internacia  
Mondlingvo Esperanto.  
Al paca batalanto  
Mi helpas venki lingvan baron,  
Alproksimigi naciaron.

*Paco* :

Ho vere, danke mi ekkonas,  
Ke gravan helpon vi proponas  
Per viaj emo kaj fervoro  
Al homfratiga kunlaboro.

*Esperanto* :

Jen mia origina celo.  
Simbolas ĝin la verda stelo,  
(montras al la stelo).  
Ke lumu ĝi en la kunvenoj...  
(ambaŭ kune foriras).

*Vivrenovigo* (venas al la scenejo) :

Sur tiu riĉe pridotita tero  
Socia kaj morala la mizero  
Ĉu tag' al tago ŝajnas pli terura,  
Ĉu ĉiam ĉi-macas jam bankroto senmezura.  
Evoluaj sekvoj de sistemo  
Ŝanĝanta sole sur la profitemo :  
Masoj laboremaj sen laboro,  
Sen nombro, seka en kalkul' faktoro  
Nesiderata estas, nur maŝino,  
Sen homo kun anima vivdestino.

multaj mankas eĉ la plej necesa  
Ĉu nura ekzistado senprogesa.  
Ĉu tempe malŝparado, luksa ĝuo

De abundaj' forjeto kaj detruo  
Pro negocem' senhonta, senkompata  
Al malespera popular' malsatal

Kaj el fruktar', el por nutraĵo greno  
Grandstila produktado de veneno  
Por ebriigo de gemizeruloj  
Ĉe trompa amuziĝ' en fumnebuloj,  
Laŭ tradiciaj stultaj trikkutimoj  
Kun parolaĵoj trans konvenaj limoj,  
Ke ĝi malfeliĉigas familiojn.  
Atakas korpan kaj spiritan sanon,  
De malriĉuloj prenas for la panon,  
Ne tuŝas parazitajn industriojn.

Triumfas nur la materio,  
(kun forta akcento)  
Kaj mono, oro iĝis Dio.  
Ho erarinta homa gento,  
(kvazaŭ preĝante)

En egoismo gravmalsana,  
Ke nove vin ekregu sento  
De la karito prakristana!  
Jen sola helpo, savo vera  
El neniĝbatal' infera!

Sed kontraŭstaras eĉ bonuloj.  
Kun fortunmitaj la okuloj,  
Ne vidas tiun altan devon  
Aŭ nomas ĝin nur belan revon,  
Ĉar ili pli « reale » vidas, (ironie)  
Reale Kriston do perfidas, (fortakcente)  
Kaj eĉ deklaras en bezito,  
Ke tia pereigmilito  
De ekspluato kaj perforto  
De Di' volita estas ordo...

*Neniam! Ne ofendu Dion!* (kun indigno)

Kaj ne misuzu religion!  
En vere divolita ordo  
Justeco regas kaj konkordo,  
Ne monavido militema,  
Sed paco, amo oferema...

(*Esperanto* kaj *Paco* proksimiĝas  
interparolante).

*Esperanto* :

Malfacilaĵoj ne timigu,  
Sed des pli forte nin instigu  
Al plua celkonscia faro.



*Vivrenovigo* (ekvidante Pacon kaj Esperanton) :

Saluton, fervorega paro!  
Jam laŭ aspekto mi vin konas.

*Esperanto* :

Invita voĉo al ni sonas.

*Esperanto kaj Paco kune* :  
Saluton!

*Paco* :

Dankon pro favoro!

*Vivrenovigo* :

Ja estis por mi nur honoro.  
Pardonu, ke mi malatentis  
Kaj min ankoraŭ ne prezentis :

*Vivrenovigo* nomo mia!

Vivrenovig' sur kamp' socia,  
Pli justan ordon konstruanta.  
Por savo el mizer' premanta.  
Vivrenovigo korp-spirita.  
Por vivo pli naturligita,  
Por nova hom' profundanima  
Kun prakristana am' senlima.

*Paco* :

Mi aŭdis kun grandega miro,  
Sopiras jam al kuna iro.

*Esperanto* :

Cu por vi estus ne utilo  
Universala parolilo?  
Mi, mondhelpingvo Esperanto,  
Jam de la paco jen servanto,  
Ageme ankaŭ vin subtenos.

*Vivrenovigo* :

Dankplene mi la helpon prenos.  
Sed nun ĝojigus min raporto  
Pri de agado via sorto.

*Paco* :

Plej granda al mi ŝajnis baro  
Nek ofte akra kontraŭstaro,  
Atakoj nek de stulta speco,  
Sed putra indiferenteco.

*Esperanto* :

Entate mank' de intereso

*Paco* :

Aŭ en amuzo sinforgeso.

*Vivrenovigo* :

Vi konvinkigu do el tio,  
Ke blindaj sklavo de pasio,  
Ke anoj de sensecaj moroj,  
Amikoj de trinkgajaj horoj,  
Ne taŭgas por konstru' de paco,  
En plej proksima jam minaco,  
Ĉar nebulitaj cerbe, mense,  
Militemiĝas senpripense. —  
Kaj krome la malinda rolo  
De *cigared' kaj alkoholo*  
Dum mondmilito ĉe armeo  
Por narkotado en tranĉeo :  
*Ne irus hom' en sobra stato*  
Besteca al amasmortbato! —  
Ekkonu, ke ebriigiloj  
Nur kontraŭ vi estas helpiloj!

*Paco* :

Veregaj estas viaj vortoj.

*Vivrenovigo* :

Vin ankaŭ helpos miaj *fortoj* :  
Anar' anime altnivela,  
Ne ebrieta aŭ sencela,  
Libera de venensklaveco,  
Potenca per la *abstineco*. (Al Esperanto)  
En atmosfero pura, hela  
Prosperos ankaŭ ar' verdstela.

*Esperanto* :

Mi ofte ja malplaĉe vidas,  
Ke ĝi kunvenas kaj kunsidas  
En ejoj pli malpli konvenaj  
Kaj bedaŭrinde funoplenaj...  
Laŭ *ĝueme*co materia  
Eĉ malgraŭ...

*Vivrenovigo* :

.....kriz' ekonomia.  
Jen ankaŭ estas nova vero :  
Reganta nun profit sistemo  
*Mem* estas grundo por la semo  
De daŭra ja militdanĝero. —  
*Por patroland'* — jen bela diro —  
Dum temas nur pri monakiro  
Por vera *sanginternacio*  
*De la armilo-industrio!*

*Paco* :

El ĉio sekvas la ekkono  
De nepre urĝa la bezono,  
Ke agu nun en firma ligo  
La Paco...

*Vivrenovigo* :

.....kaj Vivrenovigo.

*Esperanto* :

Efike do de land' al lando  
Per la praktika Esperanto!

*Junularo* (kurante kaj vigle venas al la scenejo) :

Juna, vigla, batalema,  
Idealojn sopirema,  
Volas sekvi mi kun ardo  
Al gvidanta min standardo.  
Multaloke,  
Laŭtalvoke  
Oni volas min altiri.  
Kien do mi devas iri?  
Naŭzas min silentenuo,  
Logas materia ĝuo,  
Vivo stultmondana  
Aŭ nature sana.

Jen milit', nacia gloro,  
De perforto eĉ adoro,  
Jen mondpaco, amofaro  
Por hejmlando kaj homaro.  
Jen paradoj, granda bruo  
Por renvers', revolucio,  
Jen por *orda evoluo*  
Al la *nova homsocio!*  
Kie estas la tendaro  
Por agema junularo? (serioze)  
Kie ankaŭ por aregoj,  
Taŭgaj junaj gekolegoj  
En mizer', ĉar sen laboro,  
Preskaŭ sen esper' en koro?

(rigardas supren, kvazaŭ preĝe)

Cu mi suprenvide  
Helpon petu fide?

(ĉirkaŭrigardas konsternite)

Sed kie mi do nun troviĝas?  
La mond' el la rigard' foriĝas,  
Jen kvazaŭ subĉiela halo.

*Paco, Vivrenovigo, Esperanto kune* :

*La regno de la idealo!*  
En via fajra energi'  
*Idealujon* venis vi,

Rapidis for de tero  
Al nia alta sfero.

*Junularo* (embarasite) :

Cu vere? Mi do estis tro kuraĝa?

*Ĉiuj tri* :

Ne timu tion!

*Vivrenovigo* :

.....Kun konsilo saĝa  
Reiru en vin atendantan mondon,

*Paco* :

*Por ame venki de malamo ondon!*

*Ĉiuj tri* :

Kun Dia beno, per ĉiela graco

*Vivrenovigo* :

Vi, sobre forta, estu kavaliro,  
De vera ord' kristana pioniro,

*Paco* :

Kuraĝa batalanto por la paco!

*Junularo* :

Kun Dia beno, per ĉiela graco  
Mi, sobre forta, estos kavaliro,  
De vera ord' kristana pioniro,  
Kuraĝa batalanto por la paco,  
*La Paco per la Junularo!*

*Esperanto* :

De land' al land', trans mont' kaj maro  
Efiku ĝi per kunhelpanta  
Komuna lingvo Esperanta!

*Gejunuloj* (venas, kantante laŭ la germana melodio « Stimmt an mit hellem hohem Klang », aŭ oni aŭdas nur la kantadon malantaŭ la scenejo) :

Por pac', kristana homsocio!  
Por venk' de Esperanto,  
La vastan mondon gajnos mi :  
*La juna batalanto!*

POR BONE LERNI ESPERANTON, vi devas legi bonajn librojn. Aĉetu ilin de la Eldonejo La Juna Batalanto!



## Laboro kaj batalo de la Katolika Junularo.

è *La Franca Katolika Junulara Asocio kaj la Paco.*

La venonta kongreso de la A. C. J. F. (Association Catholique de la Jeunesse Française) okazos 21-23 aprilo 1933 en Lyon. Ĝia temo estos — kun granda ĝojo ni tion vidas — *la Paco*. Oni bone preparas la kongreson per diskutado de la sama temo en ĉiuj grupoj dum la venonta vintro. Por tio oni redaktis specialan demandaron, kiu servos kiel bazo. Krom la ĝenerala demandaro ankoraŭ la Kristana Laborista Junularo (J. O. C.), la Kristana Studenta Junularo (J. E. C.) kaj la Kristana Kampana Junularo (J. A. C.) publikigis specialajn demandarojn. Bedaŭrinde manko de loko malhelpas nin, represi tiujn interesajn dokumentojn. La gazeto «Les Annales de la Jeunesse Catholique», oficiala organo de la A. C. J. F., nun preskaŭ en ĉiu numero enhavas ĉefartikolon pri la paco aŭ unu el ĝiaj problemoj, ekz. en januaro «La Mesoj por la Paco», en februaro «Norda Azio» (A. Brou), en marto «La Konflikto en Manĉurio», en junio «La Katolika Agado de la Junularo en Eŭropo» (H. Chambre, ankaŭ MOKA estas citata), en julio «La Pacproblemo kaj la Suvereneco de la Ŝtatoj» (G. Le Brun-Keris), en aŭgusto «Pensoj pri Naciismo kaj Naciismoj» (P. Barbier). Ni gratulas la francan katolikan junularon pro tiu laŭdinda paca agado!

*Interesa enketo de «Le Sillon Catholique».*

«L'Aube Nouvelle» (Nova Aŭroro), la bela demokrata revuo de «La Katolika Sulko», kiu dekomence servis la kristanan pacideon, entreprenis gravan enketon. Ĝuste en la nuna tempo de novaj naciistaj ondoj kaj danĝeroj por la mondopaco ĝi dissendis al multaj gvidantaj personoj, speciale el la juna generacio, demandaron pri gravaj internaciaj problemoj. Ĝin ricevis homoj el ĉiuj tendencoj, kaj oni volas publikigi la respondojn en speciala libro. Jen la interesa demandaro:

«Ĉu vi opinias, ke la ordono de Kristo: «Amu vin unu la alian!» devas regi la rilatojn inter ĉiuj homoj kaj entenas la profundan solvon de la internacia problemoj kaj de la franca-germana problemoj?»

Ĉu vi konsentas, ke la Ligo de Nacioj nur estas parta esprimo de socio, kiu ekzistas *per natura rajto* inter ĉiuj homoj pro la unueco de la homa naturo?

Ĉu tiu natura socio havas la rajton, interveni ĉifoje, kiam homa intereso estas minacata: militdanĝero, subpremo de malplimultoj aŭ popoloj de malalta kulturo?

Ĉu nun la konservado de la paco estas nia unua devo kiel homoj kaj eŭropanoj?

Kia vi komprenas ĝin? Ĉu nacia armado aŭ internacia organizo? Internacia potenco? Kiel? Sendanĝereco certigita *antaŭ* la malarmado aŭ *per* la malarmado? Egaleco de la armilaro inter Francujo kaj Germanujo? Deviga militservo? Rifuzo de militservo? Revizio de packontraktoj? Kiel?»

Kun intereso ni atendas la rezulton de tiu kuraĝa enketo. Cetere la revuo regule enhavas bonegajn artikolojn pri la paco. La lasta numero publikigis artikolon de nia ĉama aŭstra MOKA-sekretario D-ro Ernst Görlich «Alvoko al la Junularo».

*Hispana Katolika Junularo progresas.*

La vojo de la Hispana Katolika Junularo estis malfacila. Jam delonge ekzistis specialaj grupoj kiel la Marianaj Kongregacioj (gvidataj de jesuitoj), la Junularo de Sankta Antonio (gvidata de franciskanoj), la Rondo de Estintaj Lernejoj de la Salesanoj (gvidataj de salesanoj), sed Nacia Sekretariejo de la Katolika Junularo nur povis esti fondata en la jaro 1924. En tiu jaro okazis en Madrid kunsido de la Internacia Komitato de la «Juventus Catholica» (Katolika Junulara Internacio dissolvita 1927). Ĝi donis bonajn instigojn al la Sekretariejo. Tamen la agado nur malrapide progresis. Oni vidas tion el la fakto, ke la gazetoj, kiujn oni fondis, ĉiam

post kelkaj numeroj malaperis. — Nun la movado plivigliĝis. En aprilo 1932 aperis la unua numero de la nova gazeto «La Flecha» («la sago»), kaj ĝis nun jam aperis 5 numeroj kun sufiĉe interesa enhavo, direktoro estas Nicolas Gonzalez Ruiz. Oni organizas la laboron sur la bazo de studrondoj (Circulos de Estudios), de kiuj ekzistas 4 klasoj: ĝeneralaj studrondoj, studrondoj por laboristoj, studrondoj por kamparanoj, studrondoj por maristoj. Oni do enkondukis la belgan (kaj nun ankaŭ francan) sistemon. La organo publikigas interesajn laborprogramojn por la studrondoj. — La Hispana Katolika Junularo havos sian duan Kongreson en Santander (11-17 oktobro 1932), ĝia ĉeftemo estos «la pieco». Deko da episkopoj partoprenos. La prezidanto (José Maria Valiente) skribas en la invito: «Dio volas ĝin! Ĉiuj venu al Santander! La persekutata Eklezio vin atendas; la kruco, kiun oni volas forrabi de la nacio, etendas siajn brakojn al vi, fortanimaj junuloj; la patrolando, katolika de ĉiam, ne vidas indan estontecon, se ne tra viaj okuloj. Ni devas klopodi. La katolikaj junuloj de la tuta duoninsulo kaj de ĉiuj insuloj devas kunveni en la kantabraj montoj, por montri al Cezaro, kial estas la infanoj de Dio: kuraĝaj, fortaj, nevenkeblaj, plenaj je la Evangelio, el kiu ili vivas, por neniam morti, kaj per kiu ili deziras pleniĝi la tutan homaron».

*Dana Katolika Junularo agadas.*

La dusemajna gazeto «Katholsk Ungdom» (Katolika Junularo) estas unu el la plej bonaj revuoj, kiujn la malmultaj danaj katolikoj (ilia nombro eble estas 25.000) posedas, laŭ nia scio ĝi eĉ estas la sola dusemajna gazeto katolika en la lando. La lastaj numeroj okupiĝas pri la belega Unua Eŭkaristia Kongreso en Nordeŭropo, kiu okazis 18-21 aŭgusto en la dana ĉefurbo Köbenhavn. Ne nur partoprenis la katolikaj episkopoj de Danujo, Svedujo, Norvegujo, Finnlando kaj Islando, sed ankaŭ Kardinalo Van Rossum, prefekto de la Propagando el Romo (li mortis kelkajn tagojn poste), Kardinalo Hlond, Primato de Polujo, kaj alilandaj episkopoj kaj eminentuloj. «Katholsk Ungdom» de la 21 aŭgusto raportas pri fondo de Gralsforbundet (Gral-Ligo), nova formo de Katolika Agado, speciale en la junularo. La membroj promesas: 1. oftan komunion, 2. katolikan agados, 3. batalon kontraŭ kalumnioj kaj mensogoj. Ili volas ĝuste informi siajn protestantajn samlandanojn pri la katolikismo. La unuaj tri flugfolioj, kiujn la movado eldonis, titoliĝas: «Ĉu paradizo sur tero?» (Desgranges), «Ĉu religio estas opio por la popolo?» (H. Höjris), «Protestanto ĉe la Eŭkaristia Kongreso» (H. D. T. Kjærulff).

*Itala Katolika Junularo kaj Malarmado.*

Estas ĝojige, ke ankaŭ la itala katolika junularo en siaj gazetoj tiom ofte kaj detale okupiĝas pri la problemoj de la paco kaj malarmado. «Gioventù Nova» (Nova Junularo) kaj speciale la granda kultura revuo «Gioventù Italiana» (Itala Junularo) en la lasta tempo regule enhavis artikolojn kaj notojn pri tiuj temoj kaj okupiĝis detale pri la konfliktoj en Manĉurio kaj Sudameriko kaj pri la Malarmada Konferenco. En sia numero de septembro 1932 «Gioventù Italiana» dediĉas longan artikolon al la malarmada problemoj kaj ornamas la artikolon per bela bildo de Papo Benedikto XV-a. Ĝi komenciĝas per jenaj konstatoj: «Post preskaŭ 6 monatoj da diskutoj la Malarmada Konferenco la 23 julio prokrastis por pli longa tempo siajn laborojn, aprobante kun plimulto rezolucion, kiu enhavas nenion konkretan aŭ tre malmulte kaj kiu tute ne kontentigis la publikan opinion en la mondo, kiu atendis de tiu Konferenco praktikan helpon por la solvo de la terura krizo, kiun trapaŝas la homaro. Kiu sekvis almenaŭ supraĵe la diskutojn de Genève, ne povis ne ricevi la impreson, ke tre malmultaj el la ŝtatoj tie reprezentitaj deziris sincere malpliigi siajn proprajn armilarojn, kaj tiam venis al vi la spontana demando: Se ili ne volas malarmi, kial ili daŭrigas diskuti pri malarmado? Oni povus ankaŭ respondi kun iom da maliceco, ke malmultaj volas malarmi sin mem, sed ke ĉiuj dezirus malarmi... la aliajn.» Kaj poste la gazeto de la katolika junularo donas faktojn pri la elspozoj de armado ktp., finante per la insistaj vortoj de Papo Benedikto XV-a por vera malarmado. La legantoj de J. B. ja bone konas tiujn



vortojn. Kaj prave Bernardino Caselli finas sian artikolon : « Benedikto XV-a tiel parolis antaŭ 15 jaroj. Se liaj saĝaj konsiloj tiam estus akceptitaj kaj sekvitaj, la sekvoj de la milito estus certe estintaj multe malpli pezaj, kaj eble ne estus veninta la nuna krizo, el kiu la homaro ne scias kiel liberigi. »

#### *Bona laboro en Ĉilio.*

El la rondoj de la katolika universitata junularo de tiu sudamerika respubliko estiĝis la bonega revuo REC (Revista de Extension Cultural, Revuo de Kultur-disvastigo). Temoj religiaj, kulturaj, socialaj, politikaj kaj artaj estas pritraktataj el katolika spirito. Precipe atentinda estis speciala numero pri la sociala problemo, kiu sur pli ol 100 paĝoj enhavis gravajn artikolojn, superrigardon pri la katolika sociala movado en la diversaj landoj (precipe Germanujo, Francujo, Belgujo kaj Nederlando) kaj la tekston de la encikliko Quadragesimo Anno. En la unua numero de la kuranta jarkolekto (1932) la redaktoro resumas la celon de la revuo. Jen la ĉefaj partoj :

« Ni kun ĉiuj fortoj batalis por la rajto de la laboristo terure subpremata per la kapitalismo; ni ja defendis la privatan posedrajton, kiun malprave kontraŭbatalas la socialista kaj komunista movadoj, sed ni rekonis la veran kaj necesan limon de tiu rajto en la socia funkcio, kiun ĝi havas. Ni advokatis por la justeco rilate la salajruojn kaj indigne repuŝis la hipokritan liberecon donitan per la liberalismo. Ni parolis fine por profesia kaj korporacia organizo de la socio, por la akcioposedo de la laboristoj, por la havigo de terposedo al la plimulto de la ŝtatanoj, por minimuma salajro sufiĉa por la familioj kaj por la kreo de Fabrikejaj kaj Industriaj Konsilantaroj, en kiuj la laboristoj posedus influon kaj partoprenon je la gvidado de la industrio.

Sur la politika kampo ni batalis por la libereco en la limoj de la ordo, por la korporacia organizo de la ŝtato kaj la akcepto de la familia voĉdonrajto, fundamento de vera demokrateco.

Pri la edukado ni defendis kun Pio XI-a, ke « la familio havas la taskon, rekte donitan de la Kreinto, kaj sekve ankaŭ la rajton, eduki la infanojn, rajton neforpreneblan kaj superan al ĉiu alia rajto de la socio kaj ŝtato kaj tial neatakeblan de ĉiu tera potenco. »

REC donis sian helpon al la junaj artistoj, kiuj, forirante de malnovaj kaj kaudukaj formoj kontraŭaj al ilia kreanta genio, sciis realigi novan ideon per originalaj vojoj... »

#### *Novaj nombroj el la aŭstra « Reichsbund ».*

En la kongreso de la aŭstra katolika junulara ligo (« Reichsbund ») en Eisenstadt (pentekosto) partoprenis ĉ. 8.000 junuloj. La raporto de la sekretario sciigis, ke la Ligo nun posedas 1320 lokajn unuiĝojn kun 55.965 membroj. El la subgrupoj la Skoltoj de Sankta Georgo havas 168 grupojn kun 4.779 skoltoj, la Katolika Germana Studenta Ligo (por mezlernejoj), kiu ĉefe estas organizita en la ĉefeparkio Wien, konsistas el 73 grupoj kun 1551 studentoj.

#### *La problemo de urbo kaj vilaĝo en Kanado.*

En Montreal okazis la kongreso de la A. C. J. C. F. (Association Catholique de la Jeunesse Canadienne-Française, Asocio Katolika de la Kanada-Franca Junularo). Tiu asocio jam laboras depost 1904, en la lasta tempo ĝi sukcesis pligrandigi kaj pliaktivigi sian agadon. La ĉefa temo de la kongreso estis la problemo de urbo kaj vilaĝo. Tiom multaj personoj migris en la grandajn urbojn, ke nun en la krizo montriĝas la problemo, elkonduki parton de la urbanaro al la kamparo. S-ro Minville diris en la kongreso : « La popolnombro de 1931 konstatas, ke la malekvilibro inter la urba kaj kampara loĝantaro pligrandiĝas. Oni devas okupiĝi pri la problemo laŭ niaj principoj kaj samtempe pliiĝi la eblecojn de la vivaj fortoj. Grava estas ĉefe la reveno al la kamparo, la grada kaj efektiva okupo de nia teritorio, dank' al la kultivado de novaj regionoj, al la plibonigo de la ekzistanta terkulturo, al la diversaj lokaj kaj regionaj eblecoj kun organizo de malgranda industrio. »

## La Esperanto-Movado

En Paris sukcese okazis la 24-a Universala Kongreso de Esperanto komence de aŭgusto. Pli ol 1600 Esperantistoj el 36 landoj partoprenis. La malferman kunsidon honorprezidis reprezentanto de la Prezidanto de la Respubliko. Efektive prezidis la eksprezidanto de la Komerca Ĉambro de Paris. La stacidomoj en Paris havis atentigilojn en Esperanto.

*Nova organizo de la Esperanto-movado estas decidita en Paris.* La Kontrakto de Helsinki, kiu ĝis nun estis la bazo de la neŭtrala movado kaj kiu konstruis la centran organizon sur la Konstanta Reprezentantaro de la Naciaj Societoj (K. R.) unuflanke kaj Universala Esperanto-Asocio (UEA) aliaflanke, estas nuligita. Oni elektis komisionon, kiu ellaboras novan organizprojekton sur la bazo de jenaj principoj : « I. Estas nur unu internacia organizaĵo, kiu plenumas la nunajn devojn de ICK, UEA kaj KR. II. La internacia organizaĵo eldono ĉiujare jarlibron. III. Ĉiu membro de nacia societo estas samtempe membro de la internacia organizaĵo kaj pagas al ĝi unuecan kotizaĵon, kiu estas entenata en la nacia kotizaĵo. IV. Ĉiu loka Deleĝito estas proponata de sia loka grupo kaj aprokata de la nacia societo. Se en iu loko ne estas grupo, Deleĝito povas esti nomata de la nacia societo. V. La internacia organizaĵo estas estrata de konsilantaro, kiu konsistas el reprezentantoj de ĉiu aliĝinta societo. Tiu konsilantaro gvidas la internacian movadon. VI. La internacia organizaĵo aperigos oficialan bultenon, kiun ricevos ĉiu membro de la organizaĵo. Tiu bulteno aperos minimume dufoje en la jaro. » — La gvidantoj de UEA ne konsentis pri tio.

*Katolika diservo kun Esperanto-prediko okazis dum la kongreso en la katedralo Notre-Dame.* En katolika fakkunveno partoprenis 200 gesamideanoj.

*La 25-a Universala Kongreso de Esperanto okazos en aŭgusto 1933 en Köln.* La Lokan Kongresan Komitaton prezidas alta urba oficisto. La Jubilea Kongreso promesas fariĝi sukcesa. — Por la Kongreso de 1934 jam preparas sin la sveda ĉefurbo Stockholm. Invitis Sveda Esperanto-Federacio kaj Sveda Trafika Asocio.

*Framasonoj oĝte estas Esperanto-amikoj.* La Granda Loĝio de la Respubliko Kolombio (Sudameriko) decidis, inviti la tutmondan framasonaron pere de ĝiaj Grandaj Loĝioj kaj journaloj, akcepti kiel interkomunikilon la internacian lingvon Esperanto.

*La komunistoj ankaŭ havas bone organizitan Esperanto-movadon.* En Berlin jus okazis fondo de la Internacio de Proletaj Esperantistoj, kiu jam havas pli ol 10.000 aktivajn membrojn. Kaj ni katolikoj?

*En Brazilio la provizora registaro subvencias la Esperanto-Asociacion per 1000 milrejoj.* Simile ankaŭ la registaroj de Svedujo, Finnlando, Hispanujo kaj aliaj landoj regule mone subtenas la Esperanto-movadon.

*Internacia Pachongreseto nur en Esperanto kun multnombraj kunsidoj okazis samtempe kun la Esperanto-Kongreso en Paris.*

*Plebisciton por Esperanto, t. e. kolekton de subskriboj por peticio celanta enkondukon de Esperanto en la lernejojn, volas organizi la polaj Esperantistoj.*

*La negro Kola Ajayi nun faras vojaĝon tra Eŭropo kun paroladoj en Esperanto.* Similaj paroladvojaĝoj okazis jam multaj aliaj, ankaŭ de japanoj, hindoj ktp.

*En la Internacia Kongreso de Elektro (Paris) oni priparolis la utilecon de Esperanto por internacia normigo.* Multaj eminentaj sciencistoj parolis por Esperanto, presita raporto pri Esperanto estis prezentita al la kongreso. Laŭ propono de Prof. Lombardi oni decidis proponi al IEC (Internacia Elektroteknika Komisiono), enkonduki Esperanton en la oficialan normvortaron.

*La Literatura Kongreso de la PEN-Klubo en Budapeŝto, kiun prezidis John Galsworthy, aŭdis paroladon de la angla poeto Raymond, kiu proponis peti la Ligon de Nacioj, ke ĝi iniciatu enkondukon en ĉiulandajn lernejojn de unu komuna dua lingvo apud la gepatra lingvo.* La fama hungara verkisto Karinthy rimarkigis, ke tiu dua lingvo povas esti nur Esperanto.



## Modernaj Fabloj.

DE J. VAN HILBRINXEN.

*Se vi volas pacon...*

Juna vilaĝano estis havinta disputon kun siaj najbaroj. Tial li poste ĉiam portadis dikan bastonon kun si, kaj se li devis paroli kun la najbaroj, li firme tenis la bastonon en la mano kaj rigardis malkonfide en iliajn vizaĝojn. Do la aliaj junaj vilaĝanoj venis kune kaj batadis lin. Kiam li kuŝis sur la tero, li plendis, ke oni senkaŭze malbone traktis lin. Ili demandis lin, kial do li ĉiam portadis la bastonon. Li respondis: « Per ĝi mi volis defendi la pacon inter ni. » —

Kaj ili kredis tion. — Ĉu ne?

*La diferenco.*

Juna malsaĝa korniko bekobatis alian kornikon, kiu iom antaŭe estis forpreninta de ĝi pecon da viando. « Fi », diris maljuna, sperta kornika patrino, « Kiel oni povas esti tiel venĝema! » « Ho », respondis la juna, « ĉu vi do antaŭ nelonge ne ĉiuj atakis kaj bekomordis mian kuzinon, ĝis kiam ŝi estis mortinta? »

La maljuna korniko respondis saĝe: « Vi estas ankoraŭ tre juna kaj malsaĝa. Se unu atakas alian, ĉar li ion malbonan faris al li, tio estas venĝemo; se tamen ĉiuj atakas lin, tio estas justeco. »

*Eduko.*

La kamparano furiozis ĝis malfrua nokto, tiel ke la bestoj en la stalo maltrankviliĝis. Lia filino estis ĵus reveninta en la nokto. Dio scias, kie ŝi estis estinta.

« Patrino », diris vigla porketo, « ion tian kiel la knabino ni ne faras. Vespere ni ĉiam estas hejme. »

« Infanoj », respondis la sperta porkino, « ne estu fiercaĵaj! Se la kamparano estus tiom malmulte zorginta pri vi kiel pri la filino, kiu scias, kiaj vi estus! »

*Nobela sinjorino.*

Sur la korto kokino kaj kolombino kune manĝis grenerojn. La kokino trovis lokon, kie ili kuŝis tre dense, kaj la kolombino deziris ankaŭ profiti el tio. Sed la kokino forpelis ŝin kaj ne lasis ŝin alveni.

Jen venis rapideme kaj malĝentile la meleagrino kaj okupis la trovajon de la kokino, kiu modeste retiriĝis.

« Kial », demandis la kolombino, « vi lasis alveni la meleagrino, dum ke vi min forpelis? »

« Ho », respondis la kokino, « ŝi ja estas nobela sinjorino! »

*Unueco.*

Kondukisto de ĉevaloj estis tro multe drinkinta kaj veturis en la malhelo malĝustan vojon. Kelkaj el la vojaĝantoj de la veturilo vidis tion kaj kriis, ke li reiru. Sed la veturigisto diris: « Ĉu vi estas la veturigisto aŭ mi? », kaj la aliaj vojaĝantoj konsentis dirante, ke do tiu viro plej bone devas scii, kien la vojo iras. Kaj en la veturilo estiĝis granda bruo kaj disputo.

Kaj leviĝis blankbarba viro kun agrable profunda voĉo kaj indigniĝis pri la bruo: Homoj, kiuj kune sidas en unu veturilo, devus esti unuanimaj. Li vidus atakon al ilia komuneco en ilia konduto, se ili ne gardus trankvilecon kaj unuecon.

Dum tiu tempo la veturilo estis veninta al la fino de la vojo kaj falis kun ĉiuj vojaĝantoj en abismon...

El J. Van Hilbrinxen, « Taten und Meinungen des Herrn Fuchs und andere Fabeln », Verlag der Scholle, Berlin-Weissensee.

## Internacia Junulara Adago.

KATOLIKA JUNULARO.

*Pax Romana*, Internacia Federacio de Katolikaj Studentaj Asocioj, sukcese okazigis sian kongreson en Bordeaux kun sekvanta pilgrimo al Lourdes (7-14 aŭgusto), kelkaj centoj da delegitoj el 21 nacioj ĉeestis. La ĉefparoladojn faris Univ. Prof. Pastro Steffes (Germanujo) pri « la kristana ideo pri socia kaj internacia ordo », Prof. Bullough (Anglujo) pri « la psikologiaj kaj etikaj kondiĉoj de realigo de la socia kaj internacia ordo », Prof. Legendre (Francujo) pri « la senperaj taskoj de la katolikaj studentoj organizitaj en Pax Romana rilate la socian kaj internacian ordon ». En la praktika laboro oni pritraktis speciale la misiajn problemojn. La katolikoj devas okupiĝi pri la ekstereŭropaj studentoj (ĥinaj, hindaj, japanaj ktp.), kiuj studas en Eŭropo. Praktika laborprogramo estas skizita. Rilate la naciajn federaciojn estas interese, ke nun fondiĝis katolika studenta ligo en Bulgarujo. Pax Romana venis ankaŭ en kontakton kun la katolika studenta asocio en Montreal (Kanado) okaze de vojaĝo de la ĉefsekretario Pastro Grémaud kaj la administra sekretario Rudi Salat en Ameriko. Nove fondiĝis ankaŭ katolikaj studentaj grupoj en Cape Town (Sudafriko) kaj Mangalore (Hindujo). La katolika studenta ligo de Urugvajo volas aliĝi al Pax Romana, en Bordeaux oni jam akceptis la Federacion de katolikaj grekritaj studentoj el Rumanujo.

*Konferenco de gvidantoj de germanaciaj kaj -lingvaj katolikaj junularaj asocioj* okazis en la monaĥejo Heiligenkreuz ĉe Wien (Aŭstrujo). Gvidantoj el Germanujo, Aŭstrujo, Ĉeĥoslovakujo, Polujo, Rumanujo, Danzig, Jugoslavujo partoprenis. La Popolgermana Laborkomitato de Katolika Junularo (Volksdeutscher Arbeitskreis katholischer Jugend), kiu organizis la kunvenon, estis fondita en la Katolika Kongreso de Nürnberg (1931).

*Kongreso de Slavaj Katolikaj Studentaj Ligoj* okazis komence de septembro en Zagreb (Jugoslavujo). La sekretario de tiuj ligoj estis estiĝinta 1925, kongresoj okazis 1929 en Krakov, 1930 en Ljubljana, 1931 en Bratislava. Estas aliĝintaj asocioj de la poloj, ĉeĥoj, slovakoj, kroatoj, slovenoj, ukrainoj, kaj oni havas kontakton al rusoj, blankrutenoj, bulgaroj, macedonoj, luzaciaj serboj. La apostola movado en la spirito de la slavaj apostoloj Sanktaj Ĉirilo kaj Metodo kaj reunuiĝo de la orientaj ortodoksaj kristanoj kun la Eklezio de Kristo estas gravaj labortaskoj.

### KOMUNISTA JUNULARO.

La asocioj de la Komunista Junulara Internacio preparas la 18-an Internacian Junularan Tagon, kiu estos samtempe solenata en ĉiuj landoj. La okazigo de tiuj ĉiujaraj Internaciaj Junularaj Tagoj estis decidata en la internacia konferenco, kiun la maldekstra parto de la socialistaj junularaj asocioj okazigis 1915 en Bern. Ĝia karaktero estas tiu de bataltago kontraŭ la milito. En la nunjara alvoko de la Komunista Junulara Internacio oni parolas pri la specialaj taskoj de la komunistaj junularaj asocioj en Japanujo kaj en Ĥinujo. Oni volas venki la « malantaŭerestadon de la komunista junulara movado malantaŭ la kreskanta radikaligo de la junularo », kiun konstatis la lasta kongreso de la KJI.

Oni povas festi en ĉi tiu jaro la 25-jaran jubileon de la I-a Internacia Socialista Junulara Konferenco, kiu okazis 1907 en Stuttgart. Ĉar la plimulto de la iamaj gvidantoj poste iris al la komunismo, la KJI rajtas reklami tiun antaŭmilitan movadon por si. Speciale fieraj estas la komunistoj pri rezolucio, kiun en tiu kongreso proponis kaj akceptigis Lenin kaj Luxemburg: « Se tamen milito eksplodas, la socialistoj devas interveni por ĝia rapida ĉesigo kaj devas eluzi per ĉiuj iloj la politikan kaj ekonomian krizon kaŭzitan per la milito, por instigi la popolon al revolucio kaj plirapidigi la falon de la kapitalista regado ». Pli kritike oni hodiaŭ rilatas al aliaj decidoj de la konferenco de Stuttgart, ekz. jena: « La socialista edu-



ko de la junularo estas plej bone realigebla en propraj organizaĵoj. Tamen tie, kie tio estas ebla, organa kunligo, kie tio ne estas ebla, almenaŭ spirita komuneco devas ekzisti inter ili kaj la klaskonscia laborista movado. La socialista eduko devas esti kompletigata per la agado kaj la batalo. Tamen estas atentote, ke en partioj kaj sindikatoj la batalo estas la plej grava, dum ke en la junulara movado male klerigo estas la esenca afero... » La hodiaŭaj komunistoj konsideras tion malgusta kaj danĝera. — Cetere la konferenco de Stuttgart, kiu estis decida por la plua evoluo de la socialista kaj komunista junulara agado, tute ne estis amasa kunveno: 20 delegitoj el 13 landoj partoprenis.

La lasta numero de la « Junulara Internacio » raportas, ke la rusa Komunista Junulara Asocio (Komsomol) nun havas 5 milionojn da membroj. Tio signifus grandegan progreson, ĉar antaŭ 2 jaroj la nombro estis nur 2 milionoj. 5 milionoj estas preskaŭ la sama nombro kiel la membraro de katolikaj junularaj asocioj en la tuta mondo.

### SOCIALISTA JUNULARO.

La IV-a Kongreso de la Socialista Junulara Internacio komenciĝos la 9 oktobro en Praha. La internacia sekretariejo raportas pri jena evoluo en la lastaj 3 jaroj : la 31 decembro 1928 la 28 socialistaj junularaj asocioj en 24 landoj havis 207.507 membrojn. Krome 13 asocioj de la Internacia Socialista Studenta Federacio havis 5.600 membrojn, 9 asocioj de la Internacia Unuiĝo de Judaj Socialistaj Junularaj Organizaĵoj havis 7.611 membrojn. Entute do la SJI havis 50 asociojn en 27 landoj kun 220.718 membroj. — Tri jarojn poste (la 31 decembro 1931) 30 junularaj asocioj en 26 landoj havis 251.030 membrojn, 16 studentaj asocioj en 16 landoj havis 9.481 membrojn, 8 judaj asocioj en 8 landoj 11.620 membrojn. Entute do la SJI enhavas 54 asociojn en 28 landoj kun 272.131 membroj. Do pli ol 50.000 novaj membroj estas gajnitaj. Oni nove akceptis la asociojn el Argentino kaj Luksemburgo, en Praha estos akceptata en la SJI la junulara asocio de la brita Laborista Partio. Kredeble baldaŭ aliĝos aliaj asocioj. En la raportperiodo la plej granda organiza okazaĵo estis la II-a Internacia Socialista Junulara Kunveno en Wien (12-14 julio 1929). Ĉ. 50.000 junaj gelaboristoj partoprenis. 1930 Internacia Somera Lernejo estis organizata, 1931 Internacia Diskutado de Gvidantoj. Plej vigle oni diskutis la laboradon de la Ruĝaj Falkoj (socialistaj skoltoj). Oni ja ne venis al unueca opinio pri detaloj, sed rimarkis la utilecon de ĉiama ekzamenado de la agadmetodoj. Ĉiujare je la unua dimanĉo de oktobro Internacia Junulara Tago estas organizata kun kunvenoj en ĉiuj landoj kaj urboj. Ankaŭ internaciaj limkunvenoj estas organizataj.

### PROTESTANTA JUNULARO.

*Internacia Kunveno por Agado inter Lernantoj de Duagradaj Lernejoj* okazis 28 julio - 8 aŭgusto en Dassel (Germanujo). Estis la dua tia studkunveno, kaj 80 partoprenantoj el 23 landoj ĉeestis. Ili venis el la Kristanaj Unuiĝoj de Junaj Viroj (YMCA), el la Kristanaj Unuiĝoj de Junaj Virinoj (YWCA) kaj el la Kristanaj Studentaj Unuiĝoj. Oni diskutis pri pedagogiaj problemoj kaj pri la sinteno en la publika vivo nacia kaj internacia. Eminentaj parolantoj kunlaboris kaj speciale la parolado de D-ro John Mott, pioniro de la internacia protestanta junulara agado, pri « spirita gvidado » profunde impresis. Interesaj estis la raportoj de hindoj kaj japanoj pri la religia vivo en siaj landoj.

*Kunveno de gvidantoj el latinlingvaj landoj* okazis 21-27 junio en Chaintréauville (Francujo), 50 delegitoj el 14 landoj partoprenis, ankaŭ Sudameriko kaj Nordafriko estis sendintaj delegitojn. La ĉefa programpunkto estis la apliko de la decidoj faritaj en la lastjara Mondkonferenco en Cleveland. Oni multe klopodis pri formulo esprimanta la religian bazon kaj provizore akceptis jenan konfeson : « Antaŭ la tuta mondo ni konfesas la senliman regadon kaj sanktecon de Dio, nia patro, kiujn Jesuo Kristo revelaciis al ni kaj kiuj estas nia plej alta morala kaj religia valormezuro; la unikan signifon de la savanta vivo kaj morto de Jesuo Kristo, kiu

surmetas al ni kredon, profundan dankemecon kaj ardan deziron, sekvi nian Sinjoron kaj Majstron en la amo al proksimuloj; la komunecon kun la vivanta Kristo kaj la sanktigan renovigan forton de la Sankta Spirito, al kiu ni volas malfermi nian tutan koron; nian esperon al la alveno de la Regno de Dio kaj la pretecon, plirapidigi la proksimiĝon de tiu tempo, kiam la volo de Dio fariĝos sur la tero kiel en la ĉielo. »

### PACIFISTA JUNULARO.

*Sur la insulo Lille Oxeö okazis* komence de aŭgusto kune kun la tiea internacia junulara tendaro Internacia Konferenco de la Junularo el la Internacio de Militkontraŭuloj. Anglujo, Aŭstrujo, Belgujo, Danujo, Francujo, Germanujo, Usono estis reprezentataj. Oni diskutis la danĝerojn de la nuna mondsituacio. Oni volas sendi delegitaron eble 20-personan al Ameriko, por tie montri la volon de la pacifista junularo de Eŭropo.

*En la junulara kastelo Freusburg* (Germanujo) okazis kunvenosemajno de belga kaj germana junularo, organizita de la Mondjunulara Ligo.

*Interŝanĝon de pli ol 1000 gejunuloj* el Anglujo, Francujo, Germanujo kaj Belgujo organizis la nove fondita Internacia Amikeca Ligo (inter la vicprezidantoj troviĝas ankaŭ D-ro Solzbacher, ĉefsekretario de MOKA). En la diversaj landoj grandaj domoj estis dum 2 aŭ 3 monatoj centrejoj de internacia amikeco.

*Limkunvenoj* estas taŭga metodo por vekti kaj evolui la pacan senton inter la junularo. 10-11 septembro okazis tia kunveno kun partoprenantoj el Belgujo, Germanujo kaj Nederlando en Aachen (Germanujo). Inter la organizantoj estis la MOKA-grupo Düren.

*Tagoj de la Espero* (« Journées d'Espérance ») estas organizitaj en Francujo kun internacia partoprenantaro, precipe el la pacifista junularo, por montri, ke malgraŭ la teruraj danĝeroj de la nuna situacio en Eŭropo ni ne devas perdi la esperon... La Internacia Demokrata Paca Agado de Marc Sangnier organizis ilin.

LA PLEJ BONA MANIERO, por plibonigi kaj pligrandigi La Junan Batalanton, estas varbado de novaj abonantoj. Kiom vi jam varbis?

## Sur Nia Librotablo.

Recenzejo de novaj libroj de internacia intereso.

En Esperanto :

**BES-Adresaro** de Esperantistoj el ĉiuj landoj, 10-a eldono 1932, 120 paĝoj, 1.— fr. sv. (0.80 RM). Adreso : Bohema Esperanto-Servo, **Potštejn** Ĉeĥoslovakujo.

Riĉa adresmaterialo. 1100 adresoj (200 el Ĉeĥoslovakujo, 700 el cetera Eŭropo, 200 ekster Eŭropo) de Esperantistoj el pli ol 40 landoj; 110 portretoj sur 8 paĝoj da bilda aldono, registroj laŭ profesioj, intereso ktp., ankaŭ asocioj, gazetoj ktp. estas indikataj. La libro estas interesa por korespondemuloj, kolektantoj kaj aliaj. Tiuj, kiuj sendas 1 sv. fr. al la eldonejo, havos por tio publikigon de la adreso kun anonceto kaj senpagan liveradon de la libro. Ili povas postuli senpagan prospekton de BES.



**La konfliktoj en Manĉurio kaj Sanhajo**, Pri la agado de Universala Homama Asocio en Ĥinuĵo. 60 paĝoj, 12 ilustraĵoj, U. H. A., Kameoka, Kioto-Hu, Japanuĵo, 1932. Prezo : du Internaciaj Respondekuponoj.

Pri la rolo de la tiel nomata Universala Homama Asocio kiel helpanto de la japana imperialismo kaj militismo ni jam parolis. Nun oni eldonis ĉi tiun broŝuron, kiu enhavas multe da materialo parte tre interesa. Tamen restas la fakto nediskutinda, ke Japanuĵo faris krimon, komencante militan atakon al Manĉurio kaj Sanhajo. Kaj asocio, kiu nomiĝas homama, partoprenis en Manĉurio en « Demonstracio kontraŭ Forigo de la Japana Armeo! » Jen kelkaj strangaj frazoj : « La Ĥinoj pensas, ke la japana armeo estas kvazaŭ Dio, ĉar la fortika gardado de la japana armeo estas ja tre granda bono por ili. Kaj ili vivas timeme, pensante, ke la japanaj soldatoj foriros pro interveno de la senprudenta Ligo de Nacioj. Tute ne por protekto de kelkaj japanaj profitoj, sed ja por humaneco U. H. A. decidis partopreni al la demonstracio. Sub ĝia granda standardo kolektiĝis kelkmiloj da japanoj, rusoj, Ĥinoj kaj koreanoj kaj marŝadis, portante en la manoj UHA-flagojn kaj standardojn, sur kiuj estis skribitaj la mottoj « Konstruu Paradizon », « Internacia Rondo » ktp. » — Japana armeo konstruas paradizon en Ĥinuĵo, kiun ĝi milite atakis! Pli grandan malsaĝecon kaj hipokritecon oni apenaŭ povas imagi al si. Ni ne diras, ke Ĥinuĵo estas tute senkulpa en Manĉurio. Sed nenio rajtigas la agadon de Japanuĵo. Oomoto, U. H. A. kaj ĉi tiu broŝuro, kiu parte estas redaktita de eŭropa (hungara) Oomotooficisto, subtenas ŝovinisman kaj militisman. Multe pli simpatia estas al ni la sinteno de japanaj kristanoj, kiuj protestis kontraŭ la maljustaĵo de sia propra popolo. Jen, kion japana kristana gvidanto Toyohiko Kagawa skribis al la Ĥinaj kristanoj en Tsinan : « Karaj fratoj kaj fratinoj! Mi sentas min devigata, peti vian pardonon por mia lando. Post tio, kion ni faris, mi ne plu povas prediki en la nomo de Kristo. Mi tamen petas vin konsideri, ke, eĉ en Japanuĵo, la plimulto de la popolo estis kontraŭ la sendo de trupoj en vian provincon Santung. Kaj ni kristanoj estis energie kontraŭ tio. Pardonu nin, pardonu precipe min, ke mi ne havis sufiĉe da kristanaj fortoj por reteni la militaristojn. Sed la tago venos, kiam ni estos sufiĉe fortaj, kaj tiam niaj du nacioj vivos en harmonio kaj en la paco de Kristo. Ni japanoj amas Ĥinuĵon... » Kagawa estas pli bona heroldo de vera homamo ol U. H. A.

*La Langue Internationale, Le Problème et sa Solution* (Esperantoteksto de Unuel, franca traduko de Maur. Jaumotte), 72 paĝoj (teksto paralele en Esperanto kaj franca lingvo), Antverpeno 1932, Belga Esperanto-Instituto (11, rue du Petit Chien), prezo 5 belgaj frankoj.

*De Internationale Taal, Het Vraagstuk en zijn Oplossing*, teksto paralele en Esperanto kaj flandra lingvo (traduko de Willy De Schutter), samaj amplekso, eldonejo kaj prezo.

En la Fundamenta Krestomatio de D-ro Zamenhof troviĝas artikolo « Esenco kaj estonteco de la ideo de lingvo internacia » signita « Unuel ». Tiu S-ro Unuel estis D-ro Zamenhof mem. La artikolo ankoraŭ estas tre aktuala kaj interesa, la tradukoj estas bonaj. Efikaĵ propagandiloj!

**PLI MALMULTEKOSTAJ** estas nun multaj Esperanto-libroj. Atentu la libro-prezaron de la Eldonejo LA JUNA BATALANTO!

### En angla lingvo :

**The Catholic Social Year Book 1932**, The Catholic Social Movement in Germany, by Prof. Th. Brauer, 72 paĝoj, Oxford 1932, The Catholic Social Guild, prezo : 6 d.

La Katolika Sociala Gildo eldonis kiel jarlibron por 1932 valoran libron de Prof. Brauer pri la katolika sociala movado en Germanujo. Ĝi estas bonega verko, kiu montras la evoluon, la ĉefajn katolikajn pionirojn (Adolf Kolping, Episkopo Ketteler, Hitze, Brandts k. a.), la unuigojn, la tendencojn kaj metodojn.

**Peace Year Book 1932** with a supplement on the Disarmament Conference, 184 pĝ., National Peace Council, 39 Victoria Street, LONDON, SW 1, prezo : 1/6.

La Paca Jarlibro en sia nova eldono estas mirinda manlibro de la paca movado. Riĉa materialo pri la Ligo de Nacioj, la Manĉuria krizo, la Hoovermoratorio, la Kellogg-Pakto, la Malarmado, la komerco de armiloj, la elspezoj por armado ktp. estas tie prezentataj en taŭga kaj fidinda maniero. La nomoj kaj adresoj de preskaŭ ĉiuj pacaj asocioj en la mondo (preskaŭ 500!) estas donataj, ankaŭ de la katolikaj pacaj asocioj en Anglujo, Francujo, Germanujo, Aŭstrujo, Nederlando, Usono. Por MOKA ni trovis en la libro nur la adreson de la germana sekretario. — La jarlibro estas bonega kaj nepre necesa por ĉiu pacifista gvidanto. Ni gratulas pro ĝi la Nacian Pacan Konsilantaron!

**W. Arnold-Forster**, The Disarmament Conference, 94 pĝ., London 1931, National Peace Council, 9 d.

W. Arnold-Forster estas unu el la plej bonaj fakuloj pri malarmado. Liaj prelegoj en Genève estas famkonataj. Lia libro estas valora por ĉiu propagandisto kaj parolanto!

### En franca lingvo :

**Maurice Lecat**, L'Objection de Conscience, est-elle soutenable?, 48 pĝ., Bruxelles 1932, Internationale des Résistants à la Guerre, Section Bege, 102, Rue St-Bernard.

La aŭtoro de « Contre la Guerre » publikigis novan broŝuron, kies ĉefa parto estas parolado farita en la klubo « Le Rouge et le Noir ». Li parolas por rifuzo de militservo, kiel homo, kiel sciencisto, kiel kristano kaj kiel katoliko. En lando kun deviga militservo oni bezonas kuragon, por paroli tiajn vortojn. Legado de la pensiga libro estas rekomendinda.

### En nederlanda lingvo :

**Ds. J. B. Th. Hugenholtz**, Handboek voor de Vredesbeweging in Nederland. 192 paĝoj, N. V. Johan Mulder's Uitgevers Maatschappij Gouda, 1932, pr. 1.50 fl.

Ni recenzis la anglan Pac-Jarlibron. Por Nederlando ĉi-tiu libro estas eĉ pli bona. Ĝi donas ĉiujn informojn kaj adresojn, kiujn oni povas deziri. Ankaŭ la katolika pacmovado estas inde konsiderata, kaj Pastro J. Kors, O. P., profesoro en la Katolika Universitato Nijmegen, kaj prezidanto de la Romkatolika Paca Ligo en Nederlando, verkis principan artikolon pri « la Romkatolika Eklezio kaj la Mondpaco ». Ankaŭ eksterlandaj kaj internaciaj asocioj estas pritraktataj, speciale grava estas listo de pacifista literaturo en diversaj lingvoj kun ĉ. mil (jes, 1000!) libroj. La libro estas nepre rekomendinda!



**Wilhelm Schwer-Franz Müller**, Der deutsche Katholizismus im Zeitalter des Kapitalismus. 224 pĝ., Augsburg 1932, Literar. Institut Haas u. Grabberr, broŝ. 3.50 RM, tolbind. 4.50 RM.

La historio kaj la originoj de la katolika sociala movado kaj de la kritiko pri la kapitalismo trovis interesan priskribon en ĉi tiuj du verkoj kunigitaj en unu volumo. Univ. Prof. D-ro W. Schwer (Bonn) esploras la faktoron, ke la kapitalismo en Germanujo kaŭzis strangan ekonomian malsuperecon de la katolikoj. Li tion klarigas per pli granda retenemo al la nova sistemo. Pli granda libereco kaj sendependeco en la kritiko pri la kapitalismo rezultigis el tio. — D-ro Franz Müller (Köln) ĉefe kunmetis proprajn vortojn de katolikaj intelektuloj el la frukapitalista epoko. Speciale la tiam gvidanta gazeto « Historisch-Politische Blätter » estas serioze trastudita kaj citita. Oni vidas, ke la kritiko pri la kapitalismo estis ĉiam tre forta, sed praktikaj helpiloj plej ofte ne troviĝis. En la hodiaŭa tempo, kiam la kapitalismo ŝajnas definitive fiaski, tia historia studo estas eksterordinare interesa. Ĝi donas faktojn kaj superrigardon ĝis nun nekonitajn. Ni gratulas la aŭtorojn kaj la Katolikan Akademian Unuiĝon, kiu eldonis la verkon en sia sociologia kolekto.

**Helene Moser**, Frassati, ein moderner Christusträger. 8-o (128 pĝ., 23 bildoj), München 1932, « Ars Sacra », Jos. Müller, Friedrichstr. 18, donaca bindaĵo 1.80 RM.

De la libro « Nova Junularo », kiun J. B. rekomende recenzis en septembro 1931, malmultekosta mallongigita eldono estas publikigita. Ĝi estas arte aranĝita en la maniero de ĉiuj Ars Sacra-libroj. Rekomendinda!

**Emanuel Heufelder**, O. S. B., Christus muss König sein. 32 pĝ., 8 kunproprisitaj bildoj. München 1932, Ars Sacra, 0.40 RM.

Al la junularo la aŭtoro dediĉis sian belan libreton pri la Reĝeco de Kristo. Ĝi donas plenan dogman kaj asketikan formadon necesan por la moderna katoliko.

**Martin Manuwald S. J.**, Christuskreise. Der Jugend und ihren Führern. 2-a eldono, 8-o (VIII + 186 pĝ.), Freiburg 1932, Herder. Broŝ. 2.80 RM, kart. 3.30 RM, tolbind. 4.— RM.

Kolekti la junularon en studrondoj ĉirkaŭ la persono de Kristo, estas la celo de la Kristo-Rondoj, por kies laboro la libro donas konsilojn kaj direktivojn. Ĝi venas el praktika agado kaj estas valora. Por bona agado de Kristo-Rondoj ŝajnas esti necesa taŭga pastra gvidanto!

**Theoderich Kampmann**, Licht aus dem Osten, Dostojewskis Grunderkenntnisse über die menschliche Gemeinschaft, 240 pĝ., Breslau 1931, Bergstadtverlag, kart. 4.20 RM, tolbind. 5.50 RM.

Valora verko pri la granda ruso, kies verkoj estas tiom gravaj por vera kompreno de Rusujo. La demando: « Kiel homa komuneco povas esti ebla? » estas la ĉiama problemo de Dostojevski — kaj de nia tempo. Ni represis unu ĉapitron el la rekomendinda libro en nia numero de novembro 1931.

**Hilde Maria Kraus**, Neun Monate, 208 pĝ., Breslau 1931, Bergstadtverlag, tolbind. 4.— RM.

La aŭtorino, kiu fariĝis konata per sia verko « kuracistinoj », skribis romanon pri la patriniĝo de intelektula virino. La libro volas respiguli la spiritan situacion en la rondoj de niaj intelektuloj. Ĝi trovis indan formon, por pritrakti la delikatan problemon. Tamen la libro havas malfortajn partojn, kie la senpereco de la konfeso ŝajnas ne eŭki.

**Lisbeth Burger**, Arbeitslos, 272 pĝ., Breslau 1931, Bergstadtverlag, tolbind. 6.— RM. Eŭka romano pri la senlaboreco. Ĝi ja ne atingas en valoro kaj impresado la unuan famkonatan verkon de la sama aŭtorino (« 49 Jahre Storchentante »), sed estas nepre valora kaj rekomendinda.

**Wilhelm Mensching**, Im vierten Erdteil, Kulturfragen Amerikas, 96 pĝ., Wernigerode am Harz 1929, Hans Harder Verlag, bind. 3.25 RM.

Unu el la plej interesaj libroj pri Ameriko, kiuj ekzistas: Negroj, hinoj, hindoj, idoloj, mahometanoj, Gandhi-anoj, judoj kaj kristanoj parolas kaj rakontas. Wilhelm Mensching, la apostolo de la interpacigo de la rasoj, scias rakonti, kaj oni lernas koni tiun Amerikon, kiun oni ĝenerale ne konas. La kristanoj speciale povas lerni el la libro, kaj unu frazo el ĝi estu citata ĉi tie: « Vivu, kiel vi konfesas, kristanaro! Nur tiel vi estos ĝoja evangelio al la serĉanta mondo! » Ni represis ĉapitron el la libro en julio 1931.

## VERKOJ DE D-RO ZAMENHOF,

aŭtoro de Esperanto :

<b>Fundamento de Esperanto</b> , kv'lingva : franca-angla-germana-rusa-pola, 196 paĝoj.	RM 1.20
<b>Fundamenta Krestomatio</b> . El literaturo, poezio, scienco de ĉiuj landoj, 472 paĝoj.	RM. 3.—
<b>Lingvaj Respondoj</b> , 96 paĝoj.	RM 1.20
<b>Proverbaro Esperanta</b> , 82 paĝoj.	RM 1.50
<b>Fabeloj de Andersen</b> , 3 volumoj., 152 + 152 + 160 paĝoj, po volumo 1.40, 3 volumoj	RM 4.20
<b>Ifigenio, de Goethe</b> , 170 paĝoj.	RM 1.50
<b>Hamleto, de Shakespeare</b> , 170 paĝoj.	RM 1.20
<b>La Revizoro, de Gogol</b> , 100 paĝoj.	RM 1.50

Ankaŭ ĉiuj aliaj verkoj de Zamenhof estas haveblaj ĉe ni. Aldonu 10% por sendkostoj!

**Eldonejo LA JUNA BATALANTO, Köln-Dellbrück.**

## Nia Movado.

*Eldonejo LA JUNA BATALANTO.*

*Insista peto al ĉiuj gelegantoj.* Se vi ankoraŭ ne pagis vian abonon, bonvolu fari tion tuj! Poŝtmandatoj, papermono, ĉekoj, Respondkuponoj kaj UEA-kuponoj estas akceptataj. El landoj, kiuj ne permesas sendon de mono al eksterlando, sendu 8 Respondkuponojn (Coupon International de Réponse), kiujn vi povas aĉeti ĉe la poŝto! Se vi pro malriĉeco ne povas pagi la tutan abonprezon, sendu almenaŭ parton!

*Novaj poŝtĉekaj kontoj.* El Belgujo oni povas pagi al Konto 3313.51 (Imprimerie Disonaise, Jean Winandy, Dison), el Svisujo al Konto Luzern VII 2030 (Schweiz. Katholischer Jungmannschaftsverband, Generalsekretariat, Zug.).

*Posedantoj de poŝtĉeka konto* el Belgujo, Ĉeĥoslovakujo, Danujo, Danzig, Germanujo, Jugoslavujo, Luksemburgo, Maroko, Nederlando, Saar-Regiono, Svedujo, Svisujo kaj Tunizio povas pagi per poŝtĉeka transpagilo al Konto Köln 480.37 (Dr. Wilhelm Solzbacher, Köln-Dellbrück).



*Anglujo.*

Germana MOKA-sekretario Heinz Kolvenbach estis en junio kaj julio en Anglujo kaj starigis novajn kontaktojn.

*Aŭstralio.*

*Melbourne.* Nia kunlaboranto J. Renwick volas fondi grupon.

*Aŭstrujo.*

*Honoro al malnova pioniro.* Dimanĉe la 31 julio grupo el estraro kaj anaro de la Viena KUE (Katolika Unuiĝo Esperantista) vizitis samideanon direktoron *Schamanek* en Tullnerbach, por oficiale esprimi al li la nomigon al honora membro deciditan en la lasta ĉeikunveno. S-ro Chiba, mem iam Esperanto-lernanto de direktoro Schamanek, dankis lin pro liaj grandaj meritoj pri la ĝenerala kaj katolika Esperanto-movado kaj transdonis la honordiplomon. Frato Metodo gratulis nome de la Esperantistaj kristanaj lernejoj. Nia amiko Walter Mudrak parolis nome de la katolika Esperantista junularo (MOKA). Samideano Schamanek, kvankam 70jarulo, ĉiam juneca, sana, laborema, vigle dankis kaj entuziasmige instigis ĉiujn al plua laborado: « Ni devas esti idealistoj! » — La redaktoro de J. B. permesas al si aldoni, ke la eldonejo LA JUNA BATALANTO nun estas la eldonejo de la bonega Esperanto-lernolibro de direktoro Schamanek. Vidu anoncon!

*Landeck* (Tirolo). La ĉefsekretario de MOKA paroladis en julio pri la temoj « Kiel ni evitas la venontan militon? » kaj « Praktikaj spertoj kun Esperanto en 15 landoj ».

*Salzburg.* En misia Kunveno de la katolika junularo Frato Anselm Schwab O. S. B., nia iama MOKA-sekretario, paroladis mallonge, sed tre efike por Esperanto kaj ĝia utileco por la misia agado.

*Belgujo.*

*Gazeto « Réaliser »* (realigi), organo de la Sendependa Katolika Junularo (J. I. C.) enhavis la 18 septembro artikolon pri « la internaciaj organizaĵoj de la katolika junularo » kun atentigo pri MOKA kaj Esperanto.

*Ĉilio.*

S-ro Julio Philippi Y, delegito de la Katolika Junulara Asocio de Ĉilio, okaze de lia restado en Eŭropo ankaŭ faris viziton ĉe la ĉefsekretario de MOKA, bedaŭrinde dum lia foresto. Li volas kunlabori en MOKA kaj skribas en posta letero, ke lia asocio volas helpi laŭ siaj fortoj en la MOKA-agado. Espereble nia movado nun baldaŭ povos pli efike enpenetri en Sudamerikon, ol tio estis ebla ĝis nun.

*Francujo.*

*La nacia sekretario* Prof. P. J. A. Muffang (14 bis, av. Galois, Bourg-la-Reine, Seine) ĵus eldonis dupaĝan franclingvan varbilon por MOKA, Esperanto kaj La Juna Batalanto. Ĝi estas tre taŭga, por esti enmetata en leterojn. Prezo: 25 ekz. 1.50 fr. fr.

Ni ankoraŭfoje atentigas pri la 40-paĝa broŝuro de nia ĉefsekretario « Les Œuvres Internationales de Jeunesse Catholique », kiu kostas 2 fr. fr.

*Germanujo.*

*La nacia sekretario* Heinz Kolvenbach (Düsseldorf, Stoffeln 23) faris kelkmonatan studvojaĝon al Anglujo, Rusujo kaj Polujo. Li estas preta fari paroladojn pri siaj impresoj kaj spertoj. Grupoj skribu al li!

*Regiona kunveno de katolikaj Esperantistoj.* En Essen la 24 julio kunvenis samideanoj el Bochum, Bottrop, Cleve, Dortmund, Düsseldorf, Emmerich, Essen, Gelsenkirchen-Buer, Köln, Krefeld, München-Gladbach. La speciala diservo kun Esperanto-prediko ne okazis, ĉar tiun matenon neniu pastro estis libera. Multaj samideanoj sendis salutleterojn. Prezidis Peter Klein, mallonge paroladis Peter Klein (pri IKUE), profesoro Brenken (pri IKA), D-ro Solzbacher (pri MOKA). Gvidantoj de lokaj katolikaj junularunuiĝoj ĉeestis multnombre paroladon de la ĉefsekretario de MOKA pri « la mondlingva problemo kiel katolika tasko ». Oni faris interesajn proponojn pri reorganizo de la katolika Esperanto-movado en Germanujo. La germana ligo de IKUE estu nove organizata kaj formu kune kun MOKA agadkomitaton por propagando.

*Düren.* MOKA-grupo helpis organizi Junularan Internacian Limkunvenon en Aachen 10-11 septembro), en kiu nederlanda, belga kaj germana gvidantoj paroladis.

*Essen.* P. Klein gvidas novan Esperanto-kurson kun 20 partoprenantoj. — En la granda Katolika Kongreso (Katholikentag) okazis Esperantista Kunveno. Kvankam ĝi ne estis tre bone vizitata pro samtempaj gravaj aliaj aranĝoj, jam la anoncoj en ĉiuj oficialaj programoj signifas bonan propagandon.

*Falkenburg.* En germana-faranca kunveno de la Frataro por Interpaco (26-30 aŭgusto) la ĉefsekretario de MOKA paroladis pri praktikaj eblecoj de franca-germana interkompreniĝo.

*Köln.* Vizito de eksterlandaj grupoj kaj gastoj (el Anglujo, Belgujo, Francujo kaj Usono) donis okazon al diversaj amikaj internaciaj kunvenoj, en kiuj niaj amikoj kunlaboris.

*Krefeld.* Samideano Theodor Gather raportas pri Esperanto-kurso en Katolika Junulara Unuiĝo, li intencas fondi grupon.

*Letmathe.* Ni aŭdis pri Esperanto-kurso en la Katolika Junmetiista Unuiĝo. Gvidis instruisto Ringbeck, regiona prezidanto.

*Irlando.*

*Inter la katolikaj skoltoj* nia kunlaboranto Lorcan Oh Uiginn fervore agadas por Esperanto. Dank' al li la gazeto « An Gasog Catoiliceach » (La Katolika Skolto) enhavas nun ĉiumonatan Esperanto-rubrikon, parte en irlanda, parte en angla lingvo. Ĝi atentigas pri MOKA kaj LA JUNA BATALANTO. — Samideano Oh Uiginn publikigas ankaŭ Esperantonotojn en « The Irish Catholic » (La Irlanda Katoliko).

*Polujo.*

Germana MOKA-sekretario estis en la lando kaj vizitis amikojn.

*Soveta Rusujo.*

Germana MOKA-sekretario Heinz Kolvenbach faris studvojaĝon tra la lando. — Pri La Juna Batalanto estas intereso en la Sovetaj landoj, sed ĝenerale la polico konfiskas niajn sendaĵojn. Ekzistas ja vojo, por eviti tion, sed ĝi estas multekosta. Niaj abonantoj do nur neregule ricevas J. B.

*Svisujo.*

*Nacia Konferenco de MOKA.* En Luzern okazis la 23 julio sub prezido de nacia sekretario Eugen Vogt kunsido, kiun ĉeestis la MOKA-Delegitoj Vogt, Guldemann, Zumbühl kaj Ingold, krome 4 delegitoj de katolikaj pacaj grupoj « Pro Pace » el Basel, Zürich kaj Luzern kaj 3 reprezentantoj de la Katolika Junvira Asocio. Oni aŭdis raportojn. Niaj amikoj Zumbühl kaj Guldemann insiste rekomendis Esperanton. Post detala diskutado oni decidis fondi Centran Oficejon de Svisaj Katolikaj Pacaj Grupoj, kiu konsistu el MOKA kaj « Pro Pace ». Oni due decidis, ke la grupoj kune ellaboru programon kun minimumaj postuloj, kiu estu ankaŭ prezentata al la episkopoj. Vigla propagando en la gazetaro estu entreprenata.

*Gazeto « Jungmannschaft »* (« Junviraro ») enhavis artikoleon pri Esperanto kaj La Juna Batalanto. Ĝi gajnis al ni novajn abonantojn.

*Usono.*

*La internacia sekretario* faros dum februaro 1933 paroladvojaĝon en Ameriko laŭ invito de du popolklerigaj asocioj. Kompreneble li deziras utiligi sian restadon en la lando ankaŭ por MOKA-propagando. Niaj amikoj en Usono kaj aliaj, kiuj havas rilatojn, sendu siajn praktikajn proponojn laŭeble tuj! — Ĉu D-ro Solzbacher vizitos ankaŭ Kanadon, ankoraŭ ne estas certe.

**Familia informo.**

*Pastrigo de iama MOKA-sekretario.* En julio pastrigis en Salzburg nia amiko Eduard Macheiner, kiu estis aŭstra MOKA-sekretario en la jaroj 1926 kaj 1927. La Internacia Oficejo gratulis lin nome de la MOKA-anaro tutmonda.



## NIAJ MALMULTEKOSTAJ LIBROJ.

Ni transprenis ĉiujn Esperanto-librojn de la eldonejoj Paŭlus-Eldonejo (Meitingen, antaŭe Graz) kaj Katolika Mondo (Köln). La prezojn ni malaltigis, je 50 % aŭ pli.

### Libroj en Esperanto.

Reinke, Naturscienco, Mondkoncepto, Religio, 164 paĝoj,	1.00 RM.
Tauchmann, Garboj, bonega legolibro enhavanta 72 fabletojn, fabelojn, legendojn, priskribojn, rakontojn, 100 paĝoj,	0.60 RM.
Hanns Sappl, Kiel oni fondas kaj organizas Esperantan Grupon? Kun modela statuto por Esperanto-grupoj. Necesa por ĉiu propagandisto, 32 paĝoj,	0.20 RM.
Benedikto XV-a, Kristo kaj la Ligo de Nacioj, 16 paĝoj,	0.10 RM.
Frank, La Patro, skizo kontraŭmilita, 16 paĝoj,	0.10 RM.
Krane, Graco Atendanta, Rakonto el la tempo de Kristo, 12 pĝ.,	0.10 RM.
Prast, Tarcizio, Drama legendo el prakristana herotempo, 20 pĝ.,	0.10 RM.

### Lehrbuch und Werbeschriften in deutscher Sprache (en germana lingvo)

**Direktor Josef Schamanek, Esperanto, Lehr-, Sprech- und Übungsbuch für Schule und Selbstunterricht nebst den 16 Grundregeln und einem Auszug aus dem Übungsbuch des Fundamento von Dr. Zamenhof.** Das bewährte Lehrbuch in vierter Auflage. 74 Seiten. Preis 0.60 RM, für je 10 Ex. 1 Freistück, bei Bestellung von mindestens 20 Exemplaren 20 % Rabatt.

**Dr. H. Proells und Hanns Sappl, Die bisherigen Erfolge der Welthilfssprache Esperanto auf der ganzen Welt.** 3. Auflage, 108 Seiten. Das bekannte Werk enthält die Geschichte und Grammatik des Esperanto, eine Darstellung seiner Verbreitung auf den verschiedensten Gebieten und in allen Ländern, eine Tabelle über die Gruppen, Delegierten, Firmen und Zeitungen. Wertvoll als Werbemittel und Nachschlagewerk. Der Preis wurde gewaltig herabgesetzt und beträgt jetzt 0.40 RM, gebunden 0.80 RM.

**Hanns Sappl, Esperanto-Katechismus.** — 50 Fragen mit Antwort, in denen alles Wissenswerte über Esperanto und die Esperantobewegung kurz enthalten ist. Vorzügliche Werbe- und Aufklärungsschrift. 32 Seiten — Preis nur 0.15 RM, 10 Stück 1.20 RM, 50 Stück 4.50 RM.

Por sendkostoj aldonu 10 %!

Eldonejo LA JUNA BATALANTO, Köln-Dellbrück, Bensberger  
Marktweg 63, Germ.

*Anonceloj*, speciale pri korespondado, kosta 0.50 RM ĝis 20 vortoj.

*Haus Lindenhof*, Jugendheim bei Darmstadt, Germanujo, ŝatata aerkuracloko, dieto, frukto- kaj fruktsukokuracoj, gvidado tra centrarejnaj urboj kaj centragermanaj regionoj, instruado pri germana lingvo al eksterlandanoj, granda biblioteko en la domo, naĝbanejo apud la domo, arbaroj, montoj, teatroj, muzeoj en proksima Darmstadt (ĉiuhora aŭtobuso).

*Korespondi* deziras 18-jara katoliko. Johano C. Rourke, Litchford Hall House, Hr. Blackley, Manchester, Anglujo.

*Cu vi deziras korespondi?* Skribu al Katolika Esperanto-Grupo, Essen, Planckstrasse 117-II., Germanujo.

*Favora propono*, speciale por senlaboruloj: Ni posedas pli grandan kvanton de jenaj Esperanto-lerniloj por germanlingvanoj. Ili estas eldonitaj antaŭ la milito kaj iom polvumitaj. Ni vendas ilin malmultekoste: *Irnischer Wörterbuch Deutsch-Esperanto*, 164 paĝoj, 0.50 RM; *Die Weltsprache Esperanto*, Praktisches Lehrbuch (*Miniatur-Bibliothek*), 168 paĝoj, 0.40 RM. Eldonejo La Juna Batalanto, Köln-Dellbrück.

## Katolika Esperanto-Literaturo.

La Eldonejo LA JUNA BATALANTO estas la sola vendejo en la mondo, kie oni povas aĉeti ĉiujn katolikajn Esperanto-verkojn. Bonvolu subteni ĝian laboron kaj elekti el ĉi tiu prezaro la librojn, kiujn vi bezonas!

### 1. Apologetikaj Verkoj.

<i>De Ségur, Respondoj al kontraŭreligiaj paroloj</i> , trad. D-ro Halbedl. 224 pĝ.	1.50 RM.
<i>M. v. d. Hagen S. J., Kie estas la Eklezio de Kristo?</i> , trad. el nederlanda lingvo M. Borret, interesa ankaŭ por nekatolikoj, 172 pĝ.	1.60 RM.
<i>J. Reinke, Naturscienco, Mondkoncepto, Religio</i> , trad. el germ. E. Brenken, verko de famkonata natursciencisto, 164 pĝ.	1.00 RM.
<i>J. Schmidt, La Origino de la Religio</i> , originale verkita en Esperanto, riĉe ilustrita, pritraktanta gravan teologiaĵon laŭ natura antropologia vidpunkto, 32 pĝ.	0.50 RM.

### 2. Vivo de Kristo kaj de Sanktuloj.

<i>Giovanni Papini, Historio de Kristo</i> , Esperanto-traduko farita laŭ speciala deziro de la aŭtoro. Famkonata verko, pro kiu oni proponis la verkinton por la Nobel-Premio, 608 pĝ., broŝ. tolbind.	9.00 RM. 11.00 RM.
---	-----------------------

*Kardinalo Wiseman, Fabiola*, la mondkonata romano pri la katakomboj en bonega Esperanto-traduko de Ramo, jam en dua eldono. 440 pĝ., 8 luksaj ekstertekstaj bildoj kaj multaj ilustraĵoj en la teksto. Modelo de bona Esperanto-stilo.

6.00 RM.

*Anna von Krane, Graco Atendanta*, rakonto el la tempo de Kristo, 12 pĝ.

0.10 RM.

*I. J. Kraszewski, Kiel mortis la unuaj kristanoj*, rakonto el la tempo de la tirano Nerono, 32 pĝ.

0.25 RM.

*F. Prast, Tarcizio*, drama legendo el prakristana herotempo, taŭga por teatra prezentado, 20 pĝ.

0.10 RM.

*Modesto Carolfi, O. F. M., La Reformanto*, biografio de Sankta Francisko, bele ilustrita, verkita originale en Esperanto, 88 pĝ.

1.00 RM.

*La Floretoj de Sankta Francisko*, trad. F. Pizzi. La « Fioretti » en bonega Esperanto-traduko, 176 pĝ.

1.00 RM.

sur dika papero 1.50 RM.

*M. Carolfi O. F. M., Mallonga Biografio de Sankta Francisko*, ĉiela patrono de la katolikaj Esperantistoj kaj pacifistoj, 64 pĝ.

0.50 RM.

*M. Carolfi O. F. M., La Padova Libro*, biografio de Santa Antono, 120 pĝ., broŝ. tolbind.

1.00 RM.

1.50 RM.

*Sankta Venceslao, Patrono de Ĉeĥa Nacio*, 32 pĝ.

0.30 RM.

### 3. Papaj Enciklikoj.

*Benedikto XV-a, Kristo kaj la Ligo de Nacioj*, la encikliko *Pacem Dei* kun aldono de paca alvoko el la jaro 1919, 16 pĝ.

0.10 RM.

*Pio XI-a, Encikliko pri la Universala Reĝeco de Kristo*, 24 pĝ.

0.25 RM.

### 4. Katolikaj Misioj.

*Th. Monnens S. J., Nova Afriko*, Profunda studo pri la estonteco de la Nigra Kontinento kaj la rolo de la katolikismo en tiu lando, 32 pĝ.

0.25 RM.

*J. de Vreese S. J., Esperdona Islando*, ilustrita libro pri lando kaj popolo de katolika vidpunkto, 40 pĝ., 10 bildoj

0.60 RM.

### 5. Biblia Studo.

*J. Bianchini, Hebrea Kalendaro*, kiun uzadis la Izraelidoj dum la Jarcento de Jesu-Kristo, 16 pĝ.

0.15 RM.



## 6. Socialaj Demandoj.

- J. Duroux, Internaciismo kaj Pacifismo*, trad. Ary-Bourg, katolika broŝuro  
aperinta en la jaro 1908, 16 pĝ. 0.15 RM.
- H. de Barenton, Ruĝuloj, kion ili volas*, trad. P. Deschamps, ap. 1908, 16 pĝ. 0.15 RM.
- H. de Barenton, Flavuloj, kion ili volas*, trad. P. Deschamps, ap. 1908, 16 pĝ. 0.15 RM.

## 7. Lourdes kaj Assisi.

- Joseph Serre, La Hipotezoj pri Lourdes*, nova kompreno pri la miraklo kaj la  
naturo, 42 pĝ. 0.50 RM.
- D-ro Boissaries, Lando de Mirakloj (Lourdes)*, trad. Pastro Peltier, 32 pĝ. 0.30 RM.
- St. de Carolis O. F. M., Tra la Franciskana Urbo Assisi*, 36 pĝ., 19 bildoj. 0.30 RM.

## 8. Katolika Esperanto-Movado.

- D-ro P. Corret, Raporto pri la Unua Katolika Esperanto-Kongreso (Paris 1910)*,  
grava dokumento, 12 pĝ. 0.15 RM.
- La Katolikaj Esperantistoj ĉe la Dua Esperanto-Kongreso en Genève 1906*,  
kun la dokumentoj pri la unua interesiĝo de Papo Pio X-a pri Esperanto,  
8 pĝ. 0.15 RM.
- La Katolikaj Esperantistoj ĉe la Tria Esperanto-Kongreso en Cambridge 1907*,  
16 pĝ. 0.15 RM.
- La Katolikaj Esperantistoj ĉe la Kvara Esperanto-Kongreso en Dresden 1908*,  
16 pĝ. 0.15 RM.

## 9. Katolikaj Preĝlibroj, Kantlibroj kaj Meditlibroj.

- G. Ramboux, Katolika Preĝareto*, luksa eldono, 32 pĝ. 0.50 RM.
- M. Carolfi O. F. M., Preĝareto*, dua eldono, 48 pĝ. 0.50 RM.
- J. Sauren, Migrukunmi*, preĝlibro por junuloj kaj viroj, 336 pĝ. duontole bind. 1.45 RM.  
surogatlede bind. 2.00 RM.  
ŝafede bind. 3.00 RM.
- Spirita Juvelaro*, plej bonstila preĝlibro, 292 pĝ., tolbind. 2.00 RM.  
ledbind. 3.50 RM.
- Thomas a Kempis, Imitado de Kristo, I-a Libro*, trad. P. Deschamps, 104 pĝ. 0.50 RM.
- L. Chiba, Kantaro Katolika*, 40 preĝejaj kantoj kun muziknotoj, 80 pĝ. 0.90 RM.
- Frato Izidoro, Katolika Kantikareto*, enhavas preĝojn kaj kantojn religiajn,  
3-a eldono, 24 pĝ. 0.25 RM.
- M. Carolfi O. F. M., Katolika Preĝlibro*, 160 pĝ. elĉerpita
- Fr. Meŝtan, Preĝareto* nova eldono en preparo

## 10. Romanoj kaj Rakontoj.

- Myriam Catalany, Klari*, romano, 136 pĝ. 1.60 RM.
- L. Frank, La Patro*, skizo kontraŭmilita, aperinta 1920 en la felietono de Ka-  
tolika Mondo, 16 pĝ. 0.10 RM.
- A. Bessières S. J., Parvuli*, rakonto pri knabo, 32 pĝ. 0.25 RM.
- Jacques Freneuze, Per Telefono*, Sceneto, 8 pĝ. 0.15 RM.
- Claudius Colas, Epizodo de Milito*, verketo de la organizinto de la Unua Kato-  
lika Esperanto-Kongreso, 16 pĝ. 0.20 RM.
- U. E. Bersetzerra, La Caso al Diablo*, bonhumora rakonto, 32 pĝ. 0.20 RM.
- A. Manzoni, La Pesto en Milano*, trad. el « La Gefianĉoj », 24 pĝ. 0.40 RM.
- De Maistre, Vojaĝo interne de mia ĉambro*, 64 pĝ. 0.60 RM.

## 11. Legolibroj.

- K. Tauchmann, Garboj*, 72 fabloj, fabeloj, legendoj, priskriboj, rakontoj ktp,  
tre rekomendinda libro! 100 pĝ. 0.60 RM.
- K. Brüggemann, Unua Legolibreto*, 19 rakontoj, fabeloj kaj popolligendoj,  
64 pĝ. 0.40 RM.
- K. Brüggemann, Dua Legolibreto*, 16 artikoloj el literaturo, arto kaj scienco,  
64 pĝ. 0.40 RM.
- L. Milho, Kato kun botoj*, Fabelo por infanoj, plej simpla lingvo, 24 pĝ., 6  
bildoj. 0.15 RM.